

EL

Popola Ĉinio

人民中國報道

1 · 1963



ARTAJ FOTOJ



Vespero en dezerto

Sur la altebeneja lago Tiançi





Gonggäu:

La Nova Fizionomio de Pekino

PEKINO — la ĉefurbo de la Ĉina Popola Respubliko antaŭe estis ankaŭ la ĉefurbo de ses feŭdismaj dinastioj. Depost la Liberiĝo en 1949 oni faris ĉi tie grandskalan konstruadon por la urbo. La antikva urbo jam havas tute novan historion plenan de viveco. Ĝi ne plu estas urbo konsumata, sed jam posedas bazon de moderna industrio.

La tuta areo administrata de la urbo jam plivastiĝis de 718 kv. km. ĝis 16,800 kv. km. La loĝantoj plimultiĝis de pli ol du milionoj ĝis sep milionoj (inkluzive de la kamparanoj en la ĉirkaŭurboj sin nombrantaj pli ol du milionojn kaj okcent mil). La origina planksurfaco de konstruaĵoj (inkluzive tiun de la malnovaj palacoj kaj temploj) estis nur 20 milionoj da kv. m. Ĝis la fino de 1961, la planksurfaco de novaj konstruaĵoj jam atingis 35 milionojn kaj ducent milojn da kv. m. Inter tiuj la loĝejoj por laboristoj kaj oficistoj kaj aliaj loĝdomoj ampleksis 13 milionojn da kv. m. Tio signifas ke la ĉina popolo dum nur dekkelkaj jaroj konstruis alian novan Pekinon.

La nuna aspekto de Tian-anmen-placo, kiu lokiĝas en la centro de la urbo, estas pli impona kaj pli grandioza ol la antaŭa. La areo de la placo jam plivastiĝis de 11 hektaroj ĝis 40 hektaroj. En la suda flanko de la placo alte staras la Monumento de Popolaj Herooj. En la okcidenta flanko estas la impona kaj pompa Popola Halo, kie estas la sidejo de la plej alta instanco de la ŝtato — la Kongreso de Popolaj Reprezentantoj. En la orienta flanko estas la nove konstruitaj Muzeoj de Ĉina Revolucio kaj de Ĉina Historio en kiuj oni elmontras al la vizitantoj grandan kvanton da historiaj dokumentoj, materialoj kaj objektoj el diversaj periodoj, ekde la primitiva socio ĝis la fondiĝo de la Ĉina Popola Respubliko.

Se oni rigardas la urbon de la Longviva Kiosko sur la monteto Gingsan en la centro de la urbo, oni

unue vidas la multnombrajn ore brilantajn konstruaĵojn de la malnova palaco, kiu estas ĉirkaŭita de multaj domegoj, novaj kaj altaj. Ĉio ĉi tio pliimponigis la centron de la urbo ol antaŭe. La televidoturo de la Radio-dissenda Domego, la tegmento el bluaj glazuritaj tegoloj de la Kultura Palaco de Nacioj, la horloĝturo de la Poŝttelegrafa Domego kaj la Pekina Stacidomo leviĝas tie kaj ĉi tie alten al la ĉielo, ili kune konturas belan ondantan pejzaĝolinion de la urbo.

La ŝanĝo de Pekino estas precipe okulfrapa en la ĉirkaŭurboj. La vasta areo kun novaj domegoj dense kaj laŭvice starantaj en la nord-okcidenta antaŭurbo estas nove konstruita kultura kaj loĝeja regiono. Tie troviĝas 20-30 altgradaj lernejoj kaj universitatoj. Pro tio oni nomas ĝin “Urbo de Universitatoj”. Ankaŭ multaj nove fonditaj institutoj de la plej alta scienca organizo de la lando — la Ĉina Akademio de Sciencoj — havas sidejon tie.

Antaŭe en la orienta antaŭurbo estis vasta kamparo, sed nun ĝi jam fariĝis industria distrikto, kie fabrikoj staras sinsekve kaj altaj kamentuboj staras kiel arbaro. Tie sin trovas modernaj kotonŝpino, radi-aparata fabriko, kemia fabriko, ktp. En la okcidenta antaŭurbo oni rimarkas ke ne nur al la ferŝtala uzino Ŝigingsan alestis najbaro — la Fabriko de Specialaj Ŝtaloj, sed formiĝis unuapase ankaŭ nova industria regiono kun vaporturbina fabriko kaj aliaj pezmaŝinaj fabrikoj kiel centro. Tie estas nove konstruitaj ankaŭ termo-elektra centrejo kaj novaj ŝaktoj de karbominejo.

Kun la plivastiĝo de la areo de la urbo, la asfaltitaj vojoj disetendiĝas kiel araneajo. Dum la pasintaj dekkelkaj jaroj oni riparitis, rekonstruis kaj plivastigis la ĉefajn trafikliniojn de la urbo, kaj krome ankaŭ nove konstruis pavimitajn vojojn kun suma longeco de pli ol 1,100 kilometroj. Ĝi estas proksimume 4.4-oblo de la tuta longeco de la antaŭe



La Centra Halo de la Pekina Stacio.

Foto de Huabaŭ

ekzistantaj vojoj. Nuntempe en la tuta urbo oni havas 57 liniojn de aŭtobuso, 13 liniojn de trolea aŭtobuso, kiuj jam plene anstataŭis la antaŭe funkciintajn tramojn. La nuna kvanto de aŭtobusoj kaj elektroveturiloj nombriĝas 26-oble tiom multe kiom tiu de la jaro 1949. Krome, taksioj kaj aliaj motoraj veturiloj cirkulas sur la stratoj.

En Pekino sin trovas la plej granda stacidomo en la tuta lando — la Pekina Stacidomo. Ĝi akceptas kaj forsendas ĉiutage pli ol ducent mil pasaĝerojn. De la stacio oni povas per fervojo rekte atingi Ŝanhajon, Kantonon, Vuhan, Ĉunkinon, Langŝou, Baŭtoŭ, Ŝengjang kaj aliajn grandajn urbojn; kaj per internacia ekspreso oni povas atingi rekte Moskvon, Ulanbatoron, Pjongjangan kaj Hanojon. En aerotrafiko, oni havas aeroplanojn regule flugantajn inter Pekino kaj ĉiuj grandaj urboj de la lando; per internaciaj aerolinioj oni povas atingi Moskvon, Ulanbatoron, Pjongjangan, Hanojon kaj Rangunon.

Tra la tuta jaro, alvenadas al Pekino gastoj el ĉiuj anguloj tiel de la propra lando kiel de la tuta mondo. Ĉiuj, alveninte Pekinon, ĉiam deziras viziti la pompan Muzeon de Malnova Palaco. Tie estas montrataj pli ol centmil pecoj da historiaj kaj kulturaj objektoj, belartaĵoj kaj raraj trezoraĵoj, ĉiutage ĉi tien venas meznombro dekmil vizitantoj.

Pekino havas la plej grandan bibliotekon en la tuta lando — la Pekina Biblioteko. Je la fino de 1961, ĝi jam posedis pli ol ses milionojn da volumoj,

inkluzive ducent mil volumojn de maloftaj kaj famaj eldonoj. Por pliriĉigi sian kolekton, la Biblioteko establis interŝanĝajn rilatojn kun bibliotekoj en 106 landoj en kvin kontinentoj de la mondo.

Troviĝas en Pekino multe da kulturaj kaj artaj organizoj fame konataj tra la tuta lando kaj ankaŭ ŝtataj teatroj kaj kinejoj unuarangaj en la lando. Nuntempe oni nombras en la urbo 106 teatrojn kaj kinejojn, kun 117,000 sidlokoj.


La Pekina Laborista Stadiono, situanta en la orienta antaŭurbo, estas la plej granda sporta konstruaĵo el la lando, en kiu oni povas akcepti centmil rigardantojn. La bone ekipita Pekina Laborista Sporthalo en la orienta antaŭurbo havas pli ol dek kvin mil sidlokojn, kie okazis la 26-a Tutmonda Ĉampionec-turniro de Tablotenis en 1961.

Pekino estas fame konata en la lando kiel verdigita urbo. En printempo kaj somero, superrigardante la tutan urbon oni trovas ke ĝi estas naĝanta en verda arbomaro.

Evoluas ankaŭ tre rapide la parkokonstruo. Dum la dek tri jaroj la popola registaro unuflanke riparis la malnovajn, aliflanke konstruis multajn novajn parkojn kaj pitoreskejojn. La loĝantoj en Pekino ne bezonas veturi al malproksimaj lokoj, por trovi kontentigajn ripozejojn kaj amuzejojn.

Pekino, la koro de Ĉinio, estas unu el la plej belaj urboj de la mondo, kaj ĝi marŝas nun antaŭen laŭ la direkto de moderna urbo!

Parto de la okcidenta antaŭurbo de Pekino.



Juo Jang:

La Lulilo de la Oktobra Revolucio

LA belegaj travivaĵoj ofte impresas tiel forte, ke ili estas neforgeseblaj dum la tuta vivo. Tia ja estas mia vizito al Leningrado—la lulilo de la Oktobra Revolucio. Kvankam tio okazis antaŭ kvin jaroj, sed mia rememoro pri ĝi ankoraŭ restas tiel freŝa kaj aroma kiel ĵus deprenita floro.

En la komenco de dec., 1957, t.e. la unua monato post la 40-a datreveno de la Oktobra Revolucio, ni alvenis Leningradon. Kvankam en tiuj tagoj estis nebulo akvogutiga, tamen ĝi ne povis vuali la belecon de la urbo. La artismaj skulptaĵoj sur la stratoj, multaj riveretoj kaj pontoj, la loĝdomo de Puŝkin sur strateto, la statuo de la Bronza Kavaliro . . . ĉio ĉi, kompreneble, estas admirinda kaj interesa por la vizitantoj, sed plej allogaj estas la aferoj en konekso kun Lenin kaj la Oktobra Revolucio, nome, la krozŝipo Aŭroro, la pajla budeto apud Razliv-lago, la Vintra Palaco, Smolni-palaco ktp.

“La kanona ekstondro de la Oktobra Revolucio sendis al ni marksismo-leninismon”* — Tre konata al ni estas la kanontondro. Kiel forte ni deziris viziti la krozŝipon Aŭroro, kies kanontondro skuis la malnovan mondon kaj alportis marksismo-leninismon al Ĉinio! Kiam ni proksimiĝis al ĝi, ni vidis ke kviete fluas la rivero Neva kaj sur ĝiaj verdaj ondoj trankvile kuŝas la krozŝipo. Ja estis ĝi kiu skuis la ĉielon per siaj kanontondroj, rompis la noktan mallumon de Rusio, vekis la Orienton el ĝia profunda dormo kaj lumigis sesonon de la tero per socialisma aŭroro. La brilaj radioj klarvidigis la okulojn de la revoluciaj popoloj diverslandaj kaj lumigis ilian vojon de batalo.

Starante sur la krozŝipo ni rigardis al la Vintra Palaco sur la kontraŭa bordo kaj kvazaŭ ekaŭdis la kanonadon por la venko de socialismo. Tiu kanonado hodiaŭ jam fariĝis la porlibera hurlado de la revoluciaj popoloj kaj tondradas tra la tuta mondo. Ni kvazaŭ vidis denove la fajrlumon pompegan kiel matenruĝo, kiu fariĝis hodiaŭ la Orienta Vento


superanta la Okcidentan kaj blovanta vasten tra la tuta mondo.

Kiam ni veturis al la bordo de Razliv-lago, aperis en mia cerbo unu fama olepenetraĵo: antaŭ pajla budeto en arbaro la granda Lenin estas okupata pri verkado en sia “verda laborejo”. . . . Kiam ni atingis la pajlan budeton apud Razliv-lago, ni trovis ke la sceno tie estas sama kiel en la penetraĵo. Antaŭvespere de la Oktobra Revolucio, por fuĝi la areston de la Provizora Registaro, Stalin akompanis Lenin en la hejmon* de Jemeljanov laboristo ĉe la fervoja stacio de Razlivo, kaj tie Lenin sin kaŝis en la subtegmento de lia ligna dometo. Kaj kelkajn tagojn poste la laboristo sendis Lenin al la bordo de Razliv-lago ke li loĝu tie en la pajla budeto, sin alivestinte sarkisto. En la budeto troviĝis surtere nur tavolo da pajlo kaj nenia pordoklapo instaliĝis por bari frostan venton. Oni povas imagi al si kiel la senindulga malvarmego tiam turmentis la grandan gvidanton de revolucio! Tamen sub tia kondiĉo li elkreis sian faman verkon *La Ŝtato kaj Revolucio*.

Lenin tie loĝis ne longe kaj baldaŭ iris al Finnlando. Kvar monatojn poste la revolucio fine triumfis sub lia gvido. Hodiaŭ la pajla budeto apud Razliv-lago fariĝis pilgrima sanktejo de proleta revolucio. Kaj ĉiu, kiu vizitis tiun ĉi sanktejon kun estimo, ne povis ne kortuŝiĝi pro la noblaj revoluciistaj karakteroj de simpleco, modesteco, persistemo kaj aplombo de la granda Lenin. Depost la Oktobra Revolucio, tiom da imperiestraj palacoj disfalis, sed tiu ĉi malgranda pajla budeto estas konservata poreterne sur la bordo de Razliv-lago kaj en la koroj de la tutmonda laboristaro kaj de ĉiuj subpremataj popoloj.

Irante al la Vintra Palaco ni trapaŝis la placon antaŭ ĝi. Kiel furiozis la batalo sur ĝi dum la revolucio! Tio ne estis ordinara batalo, sed batalo inter aŭroro kaj nokto, inter libero kaj sklaveco, batalo inter socioj la nova kaj la malnova, inter

Foto de Huabaŭ



socialismo kaj kapitalismo. Kiam ni enpaŝis la Vintran Palacon, ŝajnis al ni, kvazaŭ sur la ferbarila pordo postrestus ankoraŭ la grim paj postsignoj de la maristoj, sur la marmora ŝtuparo estus sangomakuloj postlasitaj de la ruĝaj gvardianoj, en ĝia halo ŝvebus ankoraŭ la ĉielskua kanonbruado de Aŭroro kaj sur la altaj fenestroj reflektiĝus la neniam estingeb la fajrolumo de revolucio. Ni alvenis en la verdan halon el smeralda malakito, kiu, estis uzita de la kapitalista Provizora Registaro de Kerenskij kiel la lasta rifuĝejo dum la kanonado de la Oktobra Revolucio. Montrante al iu malgranda salono oni klarigis al ni ke ĝuste tie la ministroj de Kerenskij estis arestataj.

En Leningrado, la vintra nokto estas longa kaj estas malhele en la mateno. Sed kiam ni atingis Smolni-palacon, ni trovis ĝin kvazaŭ en brilaj radioj kaj ŝajnis al ni ke tie ĉiam plene regas lumo kaj tage kaj nokte.

Veninte en la iaman oficoĉambron de Lenin ni trovis ke meblaro en ĝi estas tiel simpla: kompleto da tolaj sofoj, unu ronda tableto, unu skribotablo, unu petrola lampo, unu malnovtipa telefono . . . sed ĝuste tie estis la ĝenerala komandejo de la Oktobra Revolucio. Ferminte la okulojn oni ŝajne povis

vidi la bolantajn tagojn kaj noktojn, povis senti la fortan batadon de tiu ĉi koro de revolucio. . . .

Ni vizitis poste la imponan halon de Smolni-palaco, kie okazis la Dua Kongreso de Sovetoj. De sur ĝia tribuno la granda Lenin solene deklaris al la tuta mondo la komenciĝon de la nova epoko en la homa historio, de la nova epoko de la monda revolucio. Sidante sur seĝoj en la halo kaj aŭskultante la rakontadon pri la sceno de la tempo kiam Lenin faris sian paroladon en la kongreso, ni aŭdis la sonorajn voĉojn de Lenin plenan de memfido: "Vivu la socialisma revolucio tra la tuta mondo!" kaj ni kvazaŭ aŭdis la tondrajn huraojn en la halo.

. . . . Forpasis kvin jaroj. Rapide forfluis la tempo! Sed ĝi ne povis paligi miajn memorojn: de tempo al tempo la blueverdaĵoj ondoj de la rivero Neva fluas tra mia koro kaj la kanonado de la Aŭroro resonas en mia animo kaj la senmorta pajla budeto, la sangomakulita placo antaŭ la Vintra Palaco, la iam bolinta Smolni-palaco. . . ĉio ĉi estas por mi neforgesebla dum la tuta vivo.

* Vidu "Pri Popol-demokratia Diktaturo" de Maŭ Zedong, p. 8.

Ĉengmej:

INSTRUISTINO DU

Ilustraĵoj de Huang Gongjun

EN MARTO LASTJARE Du Ĵenji, instruistino de la Elementa Lernejo de la Dekdua Strato en la Orienta Kvartalo, Pekino, estis invitita ĉeesti

kiel observanto la trian sesion de la Tria Landa Politika Interkonsiliĝa Konferenco de Ĉina Popolo. Sciiginte ke ŝi instruas en elementa lernejo, la partoprenantoj de la Konferenco intime nomis ŝin "Instruistino Du".

Ekde sia 19-a jaro, Du Ĵenji laboradis ĝis nun jam 39 plenajn jarojn kiel instruistino de elementa lernejo. Kiom da penado ŝi oferis al la edukado de infanoj dum la dekoj da jaroj! Tamen, nur post la Liberiĝo ŝi eksentis, ke la kariero de elementlerneja instruisto estas vere nobla kaj honoriga. Dum la pasintaj 39 jaroj, nur dufoje ŝi forlasis provizore la klasĉambron: unu fojo estis en la tempo de reakcia regado. Tiam, la lernejo estis devigita ĉesi funkcii, ĉar oni ne pagis salajron al la instruistoj dum dek monatoj. La alia fojo estis en la tempo post la Liberiĝo de nia lando: la lernejo, prizorgante pri ŝia sano, sendis ŝin al sanatorio por ripozo.

Post kelkdekjara laboro Du Ĵenji estas tiel spertoplena ke ŝi eĉ povas parkeri iujn tekstojn de la lernolibroj. Tio pensigas ke ŝi ŝajne povas facile plenumi siajn instruajn taskojn. Tamen, Du Ĵenji neniam



malstreĉis sian atenton en instruado. Por bone plenumi sian instruadon en la klaso ŝi ofte foje kaj refoje reviziis sian instruprojekton ĝis ŝi trovis ĝin kontentiga.

Instruistino Du ne nur serioze preparas sin por ĉiu leciono, sed ankaŭ dediĉas sian prizorgon al ĉiu aparta lernanto. Dum la someraj ferioj lastjare venis viziti ŝin Vang Juĝen, ŝia antaŭa lernantino, kiu ĵus finis sian lernadon en la instruista lernejo de la Okcidenta Kvartalo. Enirinte la ĉambron de Du, Vang Juĝen diris kun vigla entuziasmo: "Kara instruistino, la notoj de mia matematiko estis ĉiam 'bona' aŭ 'bonega'!" Instruistino Du bone komprenis la senton de Vang Juĝen. Antaŭ ok jaroj, kiam Vang Juĝen lernis en la kvara klaso, ŝi havis malsolidan bazon por lerni aritmetikon. Ŝi neniam kuraĝis levi la manon por respondi al la demandoj de la instruisto, kaj ĉiam tenis sian kapon klinita. Antaŭ kaj post la lecionoj, Instruistino Du aparte helpis ŝin prepari aŭ ripeti la lecionojn de aritmetiko. Kun la paso de la tempo Vang Juĝen iom post iom povis memfide kaj senhezite respondi al la demandoj de la instruistino. Poste, la notoj de ŝia scio pri aritmetiko restis ĉiam "bona" kaj "bonega". Kiel do ŝi povus forgesi la helpon kiun ŝia instruistino donis al ŝi?

Jaron post jaro, ĉiam kiam komenciĝis nova lernojaroj, Instruistino Du akceptis infanojn, kiuj venis mantenate de siaj gepatroj. Inter ili estis iuj, kiuj ankoraŭ ne povis lerte paroli. Ankaŭ estis iuj, kiuj eĉ ne sciis bone ligi sian zonon. Tamen, iom post iom, ili ekkonis multajn ideografiaĵojn kaj eksciis rakonti kaj kanti. Tiam, Instruistino Du sentis, ke ŝi estas la plej feliĉa homo en la mondo.

Sed iafoje Instruistino Du ankaŭ sentis ĉagrenon. Tio estis la tempo kiam ŝi trovis mankojn en sia laboro. Antaŭ nelonge, ŝi informiĝis, ke iuj gimnaziaj diplomitoj pro sia miopeco estas rifuzitaj partopreni la enir-ekzamenon por certaj fakoj de universitatoj. Pro tio ŝia koro subite premiĝis. Ŝi pensis: "Ĉu ne estas iuj el miaj lernintoj, kiuj estas miopaj?" Ŝi sin riproĉis: kvankam en ĉiu lernosemestro la sidlokoj de la lernantoj en la klaso estis ŝanĝitaj, tamen ŝi ankoraŭ ne konscie instruis la infanojn bone protekti la vidpovon. Ŝi ofte avertas sin per la frazo: "Fuŝkuracisto malutilas nur al malsanuloj; sed sendevkonscia instruisto malutilas al promesplenaj infanoj!"

Pro la seriozeco kaj devkonscieco, kiujn Instruistino Du havis por sia eduka laboro, tiu jam



donis grandajn kaj riĉajn fruktojn. Iufoje, ŝi iris por ekzamenigi pri sia kormalsano en iu hospitalo. Sentante sin maltrankvila, ŝi devis peti la flegistinon ŝanĝi la daton de la ekzameno, ĉar por tio trankvileco de la paciento estas necesa. Ĝuste en tiu momento envenis juna kuracistino. Ŝi ĝojekscitite vokis: "Kara instruistino!" Du devis longe rememori por ŝin rekoni. O! Estas tiu hontema knabineto, kiu siatempe havis du mallongajn harplektaĵojn kaj kutime vokadis tre mallaŭte: "Kara instruistino, kara instruistino!" Kaj nun, ŝi jam kreskis tiom alta. La plezuro de neatendita renkontiĝo tuj forigis la ĵusan streĉiĝon de la koro, kaj tio ebligis la ekzamenon. En la tago kiam ŝi ĉeestis la Politikan Interkonsiliĝan Konferencon, ŝi iris per aŭtomobilo. La veturigisto transdonis al ŝi saluton de iu gardisto de la kongresejo. Ĉar la gardisto estis antaŭe ŝia lernanto. Pli interese estas, ke foje irante al sia hejmvilaĝo dum la someraj ferioj, ŝi subite aŭdis alvokon ĉe elirejo de la strateto: "Instruistino Du! Instruistino Du!" Ŝi ĉirkaŭen rigardis, sed trovis neniun. Post plua rigardo ŝi trovis ke estas ŝia ekslernanto, kiu dume riparas aŭtomobilon dorsekuŝante sub ĝi. Kiam ŝi venis al la fervoja stacio, aliris al ŝi popola policisto, kiu afable akompanis ŝin en la vagonon helpeme, ĉar ankaŭ tiu estis ŝia estinta lernanto. Kaj en la vagono ŝi renkontis alian ekslernanton, kun kiu ŝi ĝoje babiladis dum la vojaĝo. Krome, ŝi ofte ricevas leterojn el fabrikoj, oficejoj, trupoj kaj lernejoj. En tiuj leteroj, ŝiaj estintaj lernantoj sendas al ŝi salutojn kaj raportas al ŝi pri siaj laboroj kaj atingoj. Leginte tiujn leterojn ŝi longe sentis sin emociita kaj ĝojigita pro tio, ke ŝia laboro jam havis bonan efikon en la socialisma konstruado de la patrolando.

En la Vasta Sovagejo

LA CEJLONA VERKISTO Ratna estas homo tre lerta; li veturigis la aŭtomobilon suden laŭ la lazura Hinda Oceano tiel rapide, ke la radoj kvazaŭ flugis ne tuŝante la teron. Kontraŭvizaĝe prezentigis nefinrigardebla tropika pejzaĝo. Pompis panarboj kaj arboj kun renformaj fruktoj. La “sukerkanoj en la dezerto” estis tiel sukoriĉaj ke se oni faras trueton en ili, la suko elfluinta sufiĉas sensoifigi vojaĝanton en la dezerto. Plej multaj estis la kokosarboj, ili ĵus ekfloris kun spikoj post spikoj pendantaj kvazaŭ gravuritaj el jado ĉe la supro de la arboj. Iu estis kolektanta florojn sur la kokosarboj. Finkolektinte tiujn de unu arbo, li lerte transiris al alia sur kokosŝnuro alte pendanta inter la kokosarboj. Lia trempasado estis vere ŝvitige konsterna por la rigardantoj. Ratna diris al mi ke el la floroj kolektitaj oni povas fari tre rafinitan vinon nomatan *arak*. Foje mi ĝin drinkis kaj konstatis ke ĝi estas bona vino.

Momenton! Mi ankoraŭ ne klarigis, ke Ratna estis tiam akompananta min por viziti la “Nacian Parkon”. La loko ne estas facile vizitebla. Ĝi situas ĉe la sudorienta kabo de la insulo Cejlono. Tie distendiĝas vastega herboriĉa ĝangalo kiun okupas diversaj birdoj kaj bestoj. Mi ne scias, kiu elpensis tian kuriozan ideon difini tiun terenon kiel “parkon”, kie estas ne permesate ĉasi sed nur eniri aŭtomobile, kaj hazarde oni povas vidi sovaĝan vivon treege mirindan. Tamen nepre ne deiru de la aŭtomobilo, por ke sovaĝaj bestoj vin ne atencu. Foje iu fotografisto, kiu volis fari kinofilmon, senbrue sin kaŝis en herbaron. Sed neatendite tio malkvietigis elefanton sin paŝantan. Ĝi rekte kuris al li, lin ekvolvinte per la rostro ĵetis lin surteren kaj piedpremis lin malforte. La homo estis tuj platigita. Malgraŭ tio,

Ruino de templo en Anuradhapura, la budaisma sankta urbo kie la ĉina bonzo Fahian loĝis antaŭ 1550 p.K.

ankoraŭ senĉese venas scivolemuloj dezirantaj ekkoni la vivon de la sovaĝbesta mondo.

Tiun vesperon ni jam eniris en la regionon de la ĝangalo kaj loĝigis en gastejo en izola vilaĝo. La lunarko pendis sur la branĉpintoj de draparbo. Vespertoj vagflugis tien kaj tien antaŭ niaj okuloj kvazaŭ ombroj. La nokta aero pleniĝis je forta odoro de sovaĝbestoj. Ratna diris ke la bestoj aktivis nur en la nokto. Kiam la suno staras alte, ili kaŝas sin en densajn herbarojn por dormi. Tiam estas malfacile ilin renkonti. Ni decidis eniri la “parkon” frumatene de la sekvonta tago. Ni ekiris tuj kiam tagiĝis. En la krepusko mi rimarkis ke tie troviĝas antikvaj templo, pagodo, ruinaĵoj de kolonoj kaj artefarita lago postrestanta de antikva tempo. Anstataŭ izola vilaĝo tie estas antikva urbo kaŝita en la granda ĝangalo.

En palpebruma momento ni alvenis al la “Nacia Parko”. Tie staras nur kradopordo, signanta la komencon de la aventuro. Post ĝi estas senlima densa herbaro apenaŭ trapenetrebla. La aŭtomobiloj povas nur iri malrapide sur vojeto malfermita tra la herbaro. Oni devas paroli mallaŭte por ke la bestoj ne estu ekscititaj.

En la veturilo aldoniĝis plia homo, la loka gvidisto nomata Pijadasa. Li havis aĝon de pli ol 50 jaroj kaj sin vestis laŭ malnova maniero. Malantaŭ la kapo pendis hartubero kaj sub la talio ĉirkaŭvolviĝis jupo. Se oni rigardas lin nur de la dorsflanko kaj ne vidas lian grizan barbon, oni eble prenos lin por maljunulino. Mi konjektis ke li nepre estis kuraĝa kaj batalema dum sia junaĝo, ĉar sur lia nuko postrestis cikatro de glavvundo.

La aŭtomobilo veturis longan tempon, sed ni vidis nenian signon de birdoj aŭ bestoj. “Ĉu vi pensas ke ni povos vidi sovaĝbestojn?” mi demandis mallaŭte.

Pririgardante la ĝangalon ambaŭflanke de la veturilo, la maljuna Pijadasa respondis kun rideto: “Tio dependas ĉu la bestoj bonvolas intervidi kun la gastoj. Iam aperas tre multaj, sed aliam montriĝas eĉ nenia signo de ilia ekzisto.”

“Estas maldece ne elveni por intervidi,” diris Ratna ekscitite kaj rapide, “ĉar la gasto ja venas





Strato de la cejlona ĉefurbo Kolombo. Foto de Hinhua

de malproksima Ĉinio." Ĝuste tiam io eksaltis de apud la radoj de la veturilo kaj susure eniris en la flavetan kaj brunpurpuran sovaĝan floraron. Tio estis granda lacerto du futojn longa, kiu ŝajnis mallerta pro sia dikeco, sed estis efektive tre facilmoŭva.

"Rigardu!" kriis Ratna per subpremita voĉo. "Jen aperis la programanoncisto. Ĉu ne sekvos belaj programeroj?"

Sed sekvis nenio speciale mirinda. Tamen estis ankaŭ interese rigardi la mienojn de la birdoj kaj bestoj riĉaj je siaj respektivaj karakterizaĵoj en tiu vasta sovaĝejo de la naturo.

Jen paradiso pavo kaj gravmiena kaj fiera kun kapo alten levita kaj longa orbrila vosto trenata post si. Kolora papilio dancis gracie. La pavo provis bekkapti ĝin, sed ne trafis. Disetendante sian voston, la birdo eligis kelkajn akrajn kriojn, montrante sian ĵaluzon kontraŭ alies beleco. Mi ne atendis, ke la mungo (*Herpestes mungo*) kiu emas manĝi najojn (speco de venena serpento *Naja tripudians*) estas tiel nervoza ke aŭdinte nur brueton ĝi jam forkuras konsternita. En la arbaro ekbrilis paro da grandaj viglaj okuloj. Kio estis tio? Je ekblovo de la vento kaj skuiĝo de la arboj aperis

bela makula cervo. La timema estajeto fikse rigardis la aŭtomobilon sen ajna timo. Kio estis timinda? Ĝi estis nenio alia ol granda rampulo denaske tiom malbela kaj ridinda. En la ĝangalo nenio estis pli senofenda ol tiu ĉi granda rampulo. Eĉ la birdetoj ne timis ĝin. Iu birdo nomata *ĝilejlej* estis sidanta en sia sabla kaveto. Kiam la aŭtomobilo haltis apude, ĝi stariĝis kaj iris kelkajn paŝojn kun kapo flanken klinita kaj okuloj turniĝantaj. Ĝi ne flugis. En sabla kaveto kuŝis kvar malgrandaj striitaj ovojn. Kiam la aŭtomobilo ekmoviĝis, la *ĝilejlej* denove sidiĝis sur la ovojn plenumante sian devon de patrino.

Kie troviĝas akvo kaj herboj, tien frekventas diversaj bestoj. La maljuna Pijadasa kondukis nin al iu lago, sur kies akvosurfaco plene svarmis neĝblankaj nimfelfloroj. Sovaĝaj bovoj estis trankvile sin paŝantaj du-aŭ-triope sur la bordo. Ili ĵetis al ni nenian rigardon, kvazaŭ dirante: "Mi ne incitas vin, kaj vi min ne incitu!" Iu alciono staris sur folio de nimfeo kaj trinkinte kelkajn glutojn da akvo ekflugis svingante la flugilojn. Ĝi haltis sur peco da putrinta ŝtupo, kaj tiu ĉi subite viviĝis kaj englutis la alcionon viva. Fakte ĝi estis intrigema krokodilo, kiu kutimas kuŝi en sunlumo kelkajn horojn senmova kvazaŭ ŝtupo, kun la buŝo larĝe malfermita. La kompatinda alciono falis rekte en ĝian buŝon.

Ankaŭ leopardo venas trinki. Aŭdinte la bruon de la aŭtomobilo, ĝi eksaltis sur rokon. Rigardante returnen al la aŭtomobilo, ĝi ekmontris la dentojn, eksvingis la voston kaj malaperis. Aro da malgrandaj aproj timigite kuris el la arbaro sub la ventron de la patrino apro. Kaj tiu ĉi hirtigis la haregojn sur la kolo kun mieno ĉion spitanta: ŝi estis preta kontraŭbatali la malamikon. Sed la malamiko ne estis videbla. Ĉu ĝi estis la leopardo? Aŭ eble granda serpento? Oni diras ke la grandaj serpentoj, kiuj estas tiel dikaj kiel granda pelvo, povas engluti eĉ patrinajn aprojn.

La maljuna Pijadasa gvidis nin tien kaj tien kaj plimultiĝis la sovaĝaj bestoj viditaj. Jen aperis ŝakalo, jen pelikano kun beko mirinde granda, jen io alia. Ili konkure sin prezentis. Sed ĉiam ni estis ial ne kontentaj en la koro, kvazaŭ io mankis inter ili. Efektive io mankis. Ĉie ni vidis fekaĵojn de elefantoj, sed ni ne renkontis la reĝon de la ĝangalo — la elefanto.

Antaŭ ni haltis alia aŭtomobilo. Oni etendis brakon el la fenestro kaj ĝin svingadis al ni, signante ke ni haltu. Ni ekhaltis, sed la brako estis ankoraŭ svingiĝanta, signifante ke ni malfunkciigu la motoron de la aŭtomobilo, ke aŭdiĝu eĉ ne brueto. Jen ĉe loko cent paŝojn for de ni kelkaj arboj estis furioze skuataj kaj baldaŭ unu el ili falis kun bruego. Tie vidiĝis elefanto, kiu ventumante per la oreloj volvis per la rostro junajn foliojn de la falinta arbo kaj ilin maĉis malrapide. Tiaj arboj similaj al palmoj estas

nomataj *diker*, kiujn la elefantoj plej ŝatas manĝi. Kelkfoje ili simple faligas la arbon kaj senĝene frandas ĝissate. La elefanto manĝis kun tia ŝato ke ĝi forgesis ĉion. Gape ĝin rigardante, ankaŭ mi forgesis ĉion, eĉ min mem, kvazaŭ nun estus pratempo kiam la homaro ankoraŭ ne ekzistis kaj antaŭ mi prezentigis vasta primitiva sovaĝejo de la naturo.

La elefanto manĝis ĝis kontentiĝo kaj ekronkinte paŝis malrapide en la pli profundan parton de la arbaro. Nur tiam ni vekigis. Mallaŭte ni ekirigis la veturilon kaj post kelkaj turniĝoj alvenis al malluma riverbordo.

“Elaŭtiĝu kaj promenu,” diris Pijadasa. “Elaŭtiĝi ĉi tie estas ne danĝere. Estu trankvilaj.”

La rivero estas nomata Munnik, trans kiu estas loko pli sovaĝa kaj sovaĝaj bestoj pli multnombraj. Homoj estas absolute malpermesataj transiri tien. La fluo estas kaj malklara kaj torenta. Ambaŭborde ĉie kreskas maljunaj arboj kun intervolviĝintaj radikoj kaj interkruciĝintaj branĉoj tiel ke la rivero estas mallume kovrita. Simioj sin kaŝantaj inter la folioj kriaĉegis, kvazaŭ farante intencan timigon. Subite iu neatendita sago ekflugis super via kapo, sed vi ne povis klare vidi de kie ĝi venis kaj kien ĝi pafiĝis.

“Ĝi estas flugsciuro — petolema estajeto,” diris Pijadasa kun levita kapo.

La trunkoj de la maljunaj arboj estis plenaj de engravuritaj nomoj de angloj kaj usonanoj, iuj eĉ de la lasta jarcento. “Kiom da jaroj fondiĝis tiu ĉi parko?” mi demandis.

“Pli ol cent jarojn,” respondis Pijadasa palpebrumante. “Nur post kiam la koloniistoj okupis Cejlonon.”

“Ah!” mi diris nereteneble, “kiel la koloniistoj scipovis sin distri difinante la vastan senhoman ĝangalon kiel ‘parkon’. Kia elpensajo!”

Eklevinte la finon de la dekstra brovo, Ratna diris: “Kiel ĝi povis esti nomata ĝangalo! En la antikva tempo ĝi estis tre grava postfronto de nia nacio. Ni estis ofte invaditaj de fremdaj nacioj. Kiam ni ne povis ilin rezisti, ni retiriĝis en tiun ĉi vastan ĝangalon, por kolektiĝi denove kaj nin rearmi. Kiam venis bona ŝanco, ni kontraŭatakis por repreni la perditan teritorion. Tio okazis multfoje en nia historio. Ĉu vi ne preterpasis antikvan urbon hodiaŭ matene? Ĝi estas la ruino de nia antikva ĉefurbo kun historio de dumil jaroj. La loko najbaras unuflanke la Hindan Oceanon kaj aliflanke ĝangalon. Tiam la malamikoj estis senkonsilaj kontraŭ ni.”

“Oh!” mi komprenis kaj diris. “Ĉar ili difinis la lokon kiel ‘parkon’, ili nepre ankaŭ starigis garnizonon tiutempe, por malhelpi vian nacion utiligi la lokon por restariĝo, ĉu ne?”

Kun sprita rideto Ratna diris: “Ili neniam tion konfesis. Ili nur diris: Por protekti la sovaĝajn bestojn, ĉasado estas malpermesata. Donu liberecon al la bestoj. Tio estis manifestiĝo de humanismo. Kiam la bestoj ricevis liberecon, la cejlonanoj ĝin perdis. Se vi ne kredas, rigardu —” Tion dirante, li montris al mi la cikatron sur la nuko de la maljuna gvidisto kaj daŭrigis: “Li preskaŭ fariĝis viktimo.”

“Ĉu glavvundo?” mi demandis.

“Ne,” respondis Pijadasa palpante sian nukon. “Mi estis mordita de besto, kaj ne ĉi tie. Mi venis ĉi tien por fariĝi gvidisto nur post la sendependiĝo. Antaŭe mia familio havis malgrandan parcelon da tero sur kiu mi kreskigis grenplantaĵojn. Por starigi teplantejon, iuj koloniistoj volis perforte aĉeti mian teron. Mi ne konsentis kaj iris al la kampo por semi kiel antaŭe. Ili ordonis luphundon ataki min kaj la besto sin ĵetis sur mian dorson kaj mordis en mian nukon. La koloniisto kiu staris sur la kamp-rando demandis rikane: ‘Ĉu vi forlasos la teron aŭ ne? Se ne, rompiĝos via kolo.’ Ĉu povus esti justeco en tiaj mallumaj jaroj! La tero estis finfine forrabita kaj ekde tiam mi devis vivi kiel vagulo. . . .”

“Jen, estas ilia civilizacio!” diris Ratna senride. “La bestojn ili traktis kun humanismo, sed la homojn kun brutulismo.”

La suno jam moviĝis ĝis la ĉielmezo kaj en la ĝangalo estis sufoke varmege. En la proksimaĵo estis marĉo. Tien alflugis granda aro da sovaĝaj gruoj, iuj kun ruĝa kapo kaj ruĝaj kruroj dum aliaj kun nigra kapo kaj nigraj kruroj. Ili ĉiuj sensisteme pistadis inter la akvokreskaĵoj per la longaj bekoj ke alten elsaltis el la akvokreskaĵoj ranoj kaj malgrandaj fiŝoj, kiujn la sovaĝaj gruoj tuj kaptis per la bekoj kaj glutis.

Rigardante la brakhorloĝon, Ratna diris: “La sovaĝaj gruoj jam komencas tagmanĝi, do ankaŭ ni devas eliri por tagmanĝo.” Ni tuj enaŭtiĝis, veturis el la “parko”, kaj adiaŭinte la maljunan gvidiston rapidis al la antikva urbo. Entute ni restadis en la besta mondo kvin horojn kaj mia menso fariĝis iom nenormala. Vidante bubalon plugantan en la kampo, mi suspektis ke ĝi estas sovaĝa bovo. Rimarkante hundon kuŝantan antaŭ domo de kamparanoj, mi prenis ĝin por ŝakalo — ŝajnis al mi ke ĉio estis sovaĝa. Kontraŭvizaĝe venis aŭtomobilo, en kiu sidis kelkaj soldatoj laŭte babilantaj kaj ridegantaj. Je la ekaŭdo mi tuj rekonis, ke ili estas usonanoj. Estis strange ke mi prenis ankaŭ ilin por bestoj.

Ratna ridis akre kaj diris: “Via misprenado tamen montras iom da malrespekto al la bestoj. La bestoj eble ne atencos vin se vi ne incitos ilin.”

Trad. Pandiso

LI BAJ



Portreto de Li Baj.

De Liang Kaj (Song-dinastio)

LI BAJ, nia genia poeto, naskiĝis en 701 p.K. en Mianĝoŭ en la nuna Siĉuan-provinco. Li estis nur dek unu jarojn pli aĝa ol Du Fu, sed apartenis al tute alia tipo de poetoj. Du Fu estas rekonata kiel la plej granda realisto de la Tang-dinastia poezio, dum Li Baj estas sendube la plej granda romantikisto. Malpli ol duonjarcento pasis post ilia morto, oni jam ekdiskutis, kiu el ili estis la pli granda poeto. Kvankam la vekto de la pesilo iom kliniĝis al la flanko de la pli juna poeto dum la pasintaj mil jaroj, tamen Li Baj ĉiam restas la pli konata, eble la plej konata enlande kaj eksterlande el la ĉinaj klasikaj poetoj. Li fariĝis jam legenda figuro kaj ofte aperas en popolaj rakontoj kaj en la scenejoj. Lian nomon konis kaj konas multaj homoj, kiuj eĉ neniam legis unu solan verson el liaj verkoj.

Laŭ lia propra aserto, la imperiestra familio kaj la lia devenis de sama praavo. Sed ni scias preskaŭ nenion pri liaj antaŭuloj kaj infanaĝo. Li ŝatis ekzercadon de skermo ekde frua juneco kaj distingis sin per kavalireco kaj malavareco. Li multe legis kaj ekverkis frue. Post la dudekjara aĝo li forlasis sian naskiĝurbon kaj multe vojaĝis. Li ankaŭ konatiĝis, dum la vojaĝo, kun eminentuloj en la literatura kaj politikaj rondoj. Li ĉiam aspiris al ŝtata ofico en la kortego por realigi sian belan revon porti feliĉon al la popoloj. Sed tio restis por li nur revo. Fine en 742, iu taoisto-poeto nomata Vu Jun rekomendis lin al Tang Minghuang, la tiama imperiestro, kaj li estis vokita al la ĉefurbo Ĉang-an. En la ĉefurbo li amikiĝis kun eminenta poeto, He Ĝiĝang kiu estimis liajn verkojn altege, kaj baldaŭ li ĝuis sensacian reputacion inter la inteligentaj nobeluloj. Ankaŭ la imperiestro verŝis sur lin ĉiujn favorojn. Tamen la maljuniĝanta suvereno jam tute dronis en volupto kaj konfidis la ŝtatajn aferojn al siaj favorataj korteganoj. Korupto kaj malordo regis ĉie. Li Baj estis honesta kaj fiera, li ne povis toleri la mallumon aŭ humiligi sin antaŭ la potenculoj. Tial ĉiuj apud la imperiestro parolis malfavore al li. La imperiestro, antaŭe admirante lin nur kiel genian poeton kaj neniam petinte lian konsilon pri la ŝtataj aferoj, nun influita de la kalumnioj, trovis lin ne taŭga por la kortego kaj donis al li forpermeson.

Li forlasis Ĉang-an en printempo de 744 kaj rekomencis sian vivon de vaganto. Li baldaŭ konatiĝis kun Du Fu kaj poste kun Ĝaŭ Ŝi, alia fama poeto. Ili kune vojaĝis dum kelkaj monatoj. La amikeco inter Li Baj kaj Du Fu daŭris ĝis ilia vivo-fino kaj restas unu el la plej belaj anekdotoj en la historio de la ĉina literaturo. La jardekon post tio li pasigis en vojaĝo al diversaj lokoj sude kaj norde kaj fine prenis loĝejon sur Luŝan (monto tre fama pro sia bela pejzaĝo en la nuna Gianghi-provinco apud Jangzi-rivero).

En 756, unu jaron post la granda ribelo de An Luŝan kaj Ŝi Siming, kiam li vivis ermite sur Luŝan, Princo Junhuang, juna frato de la nove surtroniĝinta imperiestro, kolektis sian armeon en Giangling, okcidenta parto de la nuna Hubej-provinco kaj direktis sin al Ginling, nun Nankino, laŭlonge de Jangzi-rivero. Kiam li preterpasis Hjunjang, kie Luŝan situas, li petis Li Baj aliĝi al lia ekspedicio. Li Baj opiniis, ke li estas marsanta kontraŭ la ribeluloj kaj volonte akceptis lian inviton, ne sciante

(Daŭrigo sur p. 12)

POEMOJ DE LI BAJ

Adiaŭparolo de Forlasita Edzino

Sur Ĝinŝuj¹, kiu al nordoriento
Fluas, dancante naĝas ajksoparo².
La vira sur palaca arbo nestas,
La ina sin amuzas en herbaro.
Ili preferas morti kun flugiloj frakasitaj
Ol ekdisiĝi unu de l' alia en nubmaro!

Jen Agiaŭ³, la reĝin' en malfavoro, sidis
Sola malĝoje ĉe la vesperiĝo en haremo.
Por rekonkeri la favoron de Lia Majesto
Ŝi ne avaris pagi por apologi-poemo.
Kiam Hiangĵu' poemon verkis kaj ricevis oron,
Nova pasio ekkatenis la ŝanĝeman koron.

Aŭdinte, ke li pretas svati knabinon de Maŭling
Lia edzino sendis al li adiaŭparolon:
"La akvo, kiu fluas maron, neniam refluos,
Kaj la malnova branĉo naŭzas la falintan floron,
Kuskuto⁴, kiu estas amlibera,
Kliniĝas ĉiuflanken laŭ la vento,
Kiam neatendite la usneos
Sin turnas al ĝi kun brako-etendo:
Jam sin kunligas ĉiam la du plantoj,
Sed pli kaprica estas la homsento!
Ho, ne kunvolu la junkmaton, lasu
Araneaĵon kovri ĝin por ĉiam!
Restu la kapkuseno el sukceso,
Mi en la sonĝo eble venos iam.
La akvon elverŝitan rekolektos vi kun vana peno,
Edzino forlasita adiaŭas vin jam sen reveno.



(Daŭrigo de p. 11)

lian veran intencon disputi kun sia frato pri la trono. La sekvintan printempon la armeo de Junhuang estis disbatita kaj Li Baj kiel partopreninto de ribelo estis kondamnita al ekzilo al Jelang en la nuna Gujĝoŭ-provinco. Sed en 758, la novaĵo de amnestio trafis lin sur la vojo al la ekzilejo kaj li baldaŭ revenis al Hjunjang. Nun la poeto havis jam kvindek ok jarojn. Post kvar jaroj de migrado kaj malbona farto, li mortis 762 en Dangtu (en la nuna Anhuĵ-provinco) ĉe sia onklo, guberniestro de tiu loko.

Jen tre rapida skizo de lia vivo, sed ekzistas ankaŭ mirindaj legendoj, kiuj faris lin ĉiam vivanta sur la buŝo de la popolanoj. Unu el ili diris, ke li trafis sian finon en la sekvanta maniero ke kiam li drinkis sur ŝipo en Jangzi-rivero iun lunan nokton, ekvidante la lunon en la akvo, li jetis sin en la riveron por ĝin kapti kaj dronis. Alia diris, ke li fornaĝis sur baleno kaj fariĝis senmortulo. La estiĝon de tiaj fantaziaj rakontoj kaj multe da aliaj oni povas klarigi nur per la romantika temperamento kaj originala karaktero de la poeto.

Kavalireca spirito kaj la taoismo, kiu instruas returnon al naturo estis du ĉefaj gvidantaj fortoj de lia vivo. Li ne povis toleri la maljustaĵojn en la socio kaj ĉiam revis pri rebonigo de la koruptita mondo. Kvankam li ofte kantis pri amo, vino kaj feolando, tamen li estis diferenca de la ordinaraj epikuranoj. Kompreneble li ne apartenis al la nombro de praktikaj politikaj agantoj kaj lia ideo pri rebonigo de la mondo estis nur kastelo en aero de revemulo. Tamen li estis sincera kaj fidela al sia idealo. Lia rifuĝo al la vino kaj taoismo estis rezultato de lia elreviĝo. Li montris sin ĉefe ribela spirito kon-

traŭ la reganta feŭdalisma sociordo kaj lia ŝajna rezignacio estis ankaŭ alia maniero de protesto.

La granda parto de liaj verkoj apartenis al la periodo antaŭ la ribelo de An Luŝan. Dum lia restado en Ĉang-an, la ekstera aspekto de prospero kaj florado de la imperio ankoraŭ imponis, sed jam ne povis kovri ĝian veran staton de dekadenco. Li, ekkontaktante kun la kruda realeco, verkis multe por malkovri la koruptecon de la reganta klaso. Li protestis malkaŝe kontraŭ la ambicia militismo, la putriĝinta burokratismo, la pseŭda moralo de la feŭdalismo kaj ĉiaj maljustaĵoj en la socio. Tra tiuj verkoj ĉie vibradis lia humaneco kaj patriotismo. Sed ĉion ĉi li faris nur kiel noblanima intelektulo, ĉar li ne havis okazon kontakti kun la popolamaso kaj dividi kun ĝi ĝojon kaj suferon kiel Du Fu. Tial la ĉefa noto de lia liriko estis liberigo de la individueco kaj ribelo kontraŭ ĉiuj katenoj de la feŭdalisma socio. Li sopiris al libero kaj lumo, ekstazis je fidela amo kaj konstanta amikeco, laŭdis kavalirecon kaj heroismon kaj esprimis senlimajn indignon kaj malestimon al ĉio kontraŭa. Li ĉiam staris sen timo aŭ humiliĝo antaŭ potenco.

Li posedis mirindan imagpovon kaj spontanecon de stilo. Ĉio elfluis el sub lia plumo tiel facile kaj neatendite kvazaŭ per miraklo. Eĉ tre banala aĵo ekfariĝis brilanta gemo ĉe la tuŝeto de lia magia bastono. Krome, la sorĉa melodio de liaj versoj ravas ĉiujn legantojn tiel, ke oni neniam povos forgesi. Li Baj asimilis la plej bonan tradicion de la klasikaj verkistoj kaj ankaŭ de la popolaj kantoj, sed per tio li kreis por si tute individuan poezion, kiun neniu povis sukcese imiti. Li estis kvazaŭ la enkorpiĝo de la poezio mem. Li mortis antaŭ 1201 jaroj, sed liaj verkoj restas ankoraŭ freŝaj por la legantaro.

1. Ginŝuj: rivero apud Ĉengdu, la ĉefurbo de Siĉuan-provinco.
2. Aix galericulata. Tre bela akvobirdo. Oni ofte prenas ĝin kiel simbolon de geedza amo.
3. Agiaŭ: unua reĝino de Vudi (la kvina imperiestro de Han-dinastio, regis 140 a.K.—87 a.K.). Ŝi ne naskis kaj falis en malfavoron. La legendo diris, ke ŝi donacis cent ĝinojn (50 kg.) da oro al Sima Hiangju, la tiama plej fama verkisto, kaj petis lin verki por ŝi poemon por reakiri la imperiestran favoron. Kiam Sima Hiangju ricevis la monon, li intencis preni knabinon el Maŭling kiel konkubinon. Ĝuo Vengjun, lia edzino, verkis poemon por lin adiaŭi. La atribuita al ŝi poemo restas tre fama en la historio de la ĉina literaturo.
4. Specio de ramptiga vegetaĵo (*Cuscuta japonica*)
5. Specio de ramptiga vegetaĵo (*Usnea longissima* Ach)
6. Han Ping estis oficisto en la kortego de reĝo Kanghuang de Song-regno. Li havis tre belan edzinon. Song Kanghuang perforte kondukis ŝin al sia palaco kaj devigis ŝin esti lia konkubino, sed ŝi rifuzis. Tiam la reĝo ordonis konstrui al li belvidejon nomatan Kinglingtaj kaj registrigis Han Ping inter la laboristoj por tio, ke oni turmentu lin ĝismorte per penega laboro. Sciiginte pri la morto de sia edzo, la edzino sin ĵetis de sur la belvidejo al la tero kaj mortigis sin. Ekzistas en nia literaturo belegaj rakontoj el tiu legendo.

Batalo ĉe la Sudo de la Urbmuro¹

Lastjare ĉe la fonto de Sanggan² oni batalis
Kaj nune en la valo de Congling-rivero³:
En Tjaŭĝi-mar⁴ oni lavas iam la armilojn
Kaj paŝtas la ĉevalojn en la neĝ' sur Mont' Ĉielo.
Jen armeanoj ĉiuj maljuniĝas
Trans dekmil lioj sub la Marsa pelo.
Anstataŭ terkultur', buĉado estas la meti' de hunoj,
Surkampe oni vidas simple flavan sablon kaj
blankajn ostarojn!
Muregon Kin⁵ konstruis por forbari la invadon,
Dum Han⁶ ankoraŭ levas oni alarmosignalojn.
Ne ĉesas alarmosignaloj bruli,
Nek ĉesos iam la sanga batalo.
Kiam surkampe falis la rajdanto,
Al la ĉielo triste henas la orfa ĉevalo.
Korvoj kaj milvoj bekŝiras intestojn,
Forflugas kaj pendigas ilin sur la velkbranĉaro.
Soldatoj iĝis sterko por herbaĉoj,
Senpova restas jam la generalo.
Pruviĝas, ke armilo estas supera malbono,
Saĝuloj uzas ĝin nur kontraŭvole pro nepra bezono.⁷

1. La temon unue kantis popola kanto el Han-dinastio kaj multaj poetoj prunte prenis la malnovan titolon de tiu kanto. Tiu ĉi poemo de Li Baj restas la plej konata el ili.
2. La nuna Jungding-rivero, kiu havas sian fonton en Ŝanhi-provinco, fluas tra Ĉahar, Hebej kaj fine en la Grandan Kanalon ĉe Tiangin.
3. Congling: granda montaro ĉe la orienta flanko de Pamiro.
4. Tjaŭĝi estas la ĉina nomo de Sirio sub la regado de Seleucida dinastio. Ĉi tie aludas al la regiono ĉe la oriento de Eŭfrato.
5. Kin-dinastio regis 246—206 a.K.
6. Han-dinastio regis 202 a.K.—220 p.K.
7. La lastaj du linioj estas citaĵo el *Laŭzi*, verko de la granda taoisto kun la sama nomo.

La Leviĝo kaj Subiro de la Suno

La suno leviĝas de la oriento,
Kvazaŭ emerĝus ĝi el sub la tero:
Ĉielon trakurinte, ĝi reiras en la maron.
Kie la ripozejo de l' ses drakoj en vespero?*

De la komenco ĝis eterno ĝi neniam haltas.
Ĉu homo, ne estante kreo-forto,
Povus ja longe vagi kun ĝi sur la tempo-relo?
Herboj ne dankas la printempon pro sia florado,
Kaj arboj ne kulpigas la aŭtunon pri la velko.
Kiu ja kvar sezonojn iam pelus per vipklako?
Ĉio estiĝas kaj finiĝas: jen de la Naturo verko.
Hihe, ho sun-veturigisto!
Kial vi dronas en la abisma obskuro?
Kian meriton havas Lujang, ke li
Baris per lancosving' al la sun-kuro?*

Kia krimego tio estas
Kontraŭ ĉielo kaj Naturo!
Mi volus jam la tutan kosmon ĉirkaŭbraki
Kaj unuigi kun la vivofont' en la eterna lulo!

* Laŭ la ĉina mitologio, la veturilo de la sundio estas tirata de ses drakoj.

** Lujang estis legenda heroo. Por prokrasti la subiron de la suno dum furioza batalo, li eksvingis sian lancon kaj la suno retroiris.





Longa Disiĝo

Pluraj printempoj pasis, sed ne venas li ankoraŭ.
 Ĉe l' jadfenestro l' ĉerizuj' kvinfoje jam en floro.
 Leteroj karesvortaj venis iam,
 Ĉe l' malferm' nur ĝemis mia koro.
 Tie sopir' turmenta,
 Ĉi tie malespero.
 La hararanĝon mi ne zorgas plu pro korsufero:
 Kirliĝas tristaj pensoj kiel neĝo sub ventpelo.
 Lastjare al hejmenreven' mi penis lin instigi,
 Ĉitju-jare mi reskribis por lin rapidigi.
 Blovu, ho, blovu orienta vento,
 La vagantan nuberon blovu al mi en la okcidento!
 Vana atend'! Li ĉiam ne revenas,
 Nur la falintaj floroj sur la musk' senbrue svenas.

La Ĉiam Sopirata

La ĉiam sopirata
 En Ĉang-an estas nun.
 Griloj ĉe l' putomuro ĉirpas triste en aŭtun'.
 La junkomat' impresas fride dum la frua prujn'.
 Ĉe orfa duonhela lamp' mi dronas en medito,
 Disŝovas la kurtenon, ĝemas vane al la lun'.
 Tie trans la nubaro fore foras mia belo:
 Supre senfine blua pendas la alta ĉielo,
 Kaj sube ondas, ŝaŭmas longa verdakva rivero.
 Senlima estas la ĉielo kaj la voj' — peniga,
 Eĉ en la nokta sonĝ' neatingeblas la korcelo.
 Ho, ĉiam sopirata!
 Kruelas la sufero!

Zije-kanto Aŭtuna *

La tuta Ĉang-an estas nun banita en lunlumo
 Kaj ĉie eĥas vestobastonado laŭ kutimo.
 Ne povas la aŭtuna vento iam ĝin forblovi,
 Tiun etoson de Jumen', etoson de l' landimo.**
 Kiam la malamikojn oni sukcesus disbati
 Kaj l' edzo ĉesus militservi en la malproksimo!

* Zije estis virino el Gin-dinastio. Ŝi lertis en kantado. Ŝiaj kantoj ĉefe esprimis virinajn sopirojn kaj estis multe ŝatataj kaj imitataj. Konservigis granda

kvanto da tiuj anonimaj kantetoj. Parto el ili estis nomata Zije-kantoj pri la kvar sezonoj. Tiu ĉi poemeto de Li Baj estas unu el la kvar de liaj imitaĵoj de tiu-specaj kantoj.


** Jumen: pasejo en la nuna Gansu-provinco.

Al Onklo Jun ĉe la Adiaŭa Festeno sur Pie Tiaŭ * Pavilono en Juanceng

La hieraŭa tago min forlasis jam nereteneble!
 La hodiaŭa tag' per zorgoj mian koron taŭzas febre!
 Ostardojn** la aŭtuna vent' tra dekmil' lioj pelas,
 Pro tio, ni sur beletaĝo distre drinku nepre!
 Viajn prozverkojn stampas la klasika elokvento,
 Ne malpli mi fieras pri mia poettalento,
 Sur la flugilo de la fantazio ni deziras
 Ambaŭ brakumi l' brilan lunon sur la firmamento.

Vespera Idilio.

Ĉinstila pentraĵo de Li Kejan



Vertical Chinese text on the right side of the painting, likely a signature or inscription.

*Mi glave batis akvon bari, sed ĝi ree fluas,
Per vin' mi penas solvi l' triston, sed ĝi ĉiam pluas.
Morgaŭ vi boateton gvidos kiel fiŝkaptisto,
Ĉar, ho ve! pri l' vantaĵoj mondaj longe vi enuas.*

* Ŝie Tiaŭ (464—499), fama poeto, estis iam prefekto de Ŝuanĉeng (en la nuna Anhuĵ-provinco), kie li multe verkis por kanti ĝian belan pejzaĝon. La pavilono estis dediĉita al lia memoro.

** Ostardo = sovaĝansero.

Al Lu, Kiu Forvojaĝas

*Kaj fore kaj proksime, ĉie regas la aŭtuno,
Ekster la pordo, la montvicoj staras en silento.
Kiel konato, jen numero blanka malproksime
Ŝvebpendas super la montaro Cangvu* en atendo.
Mi volas scii, jes ja, kiam vi revenos hejmen,
Ho gru' de Ludan**, kiu flugas al la okcidento?*

* Cangvu: montaro en Hunan-provinco.

** Ludan estis magiisto nemortema, kiu povis transformi sin en grupon kaj flugadis sur la ĉielo. Ĉi tie la poeto aludis al sia amiko.

Forlaso de Bajdi en la Mateno*

*En matenuĝo ni forlasis la monturbon Bajdi,
Ĉe la tagfin' alvenas ni Giangling** post mil lioj.
Boat' malpeza preterpasis jam sennombrajn montojn,
Eĥas ankoraŭ ambaŭborde la simiaj krioj.*

* Bajdi, urbo proksime de la nuna Fenggie-gubernio en Siĉuan-provinco.

** Giangling, en Hubej-provinco. Ambaŭ lokoj estas ĉe la bordo de Jangzi-rivero.

Al Meng Haŭĵan, Kiu Veturas al Jangĝoŭ***

*Mia amik' forlasis Pavilonon Flava Gruo†
Por Jangĝoŭ en monato tria, pompa florsezon'.
Jen la izola velo dronis jam en fora bluo,
Nur la rivero fluas ĉiam sur la ĉiel'fon'.*

* Meng Haŭĵan, fama poeto (689—740).

** Jangĝoŭ, urbo sur la norda bordo de Jangzi-rivero, oriente de Nankino.

† Pavilono Flava Gruo estis en Vuĉang, Hubej-provinco.

Tuj aperos:

Proletoj de la Tuta Mondo Unuiĝu por Oponi Nian Komunan Malamikon

En Esperanto
Eldonita de la Fremdlingva
Eldonejo

Ricevebla por ĉiuj abonantoj
de EPC. Tiuj, kiuj ĝin deziras
bonvolu sin turni al la adminis-
tracio de Ĉina Esperanto-Ligo

*Adiaŭ al Lu, Kiu Veturos al Pipa-kanjono**

*La venta nokto de aŭtun' en akva lando
Ne estas ĝusta tempo por veturi for.
Ĉang-an en sonĝo kvazaŭ! Kiam por ni ambaŭ
Tien reiri venos jam favora hor'!*

* Pipa-kanjono: en Jangzi-rivero kontraŭ Vuŝan, en Siĉuan-provinco.

Poemo


*Ne forbalaebila estas lumo luna;
Kaj ne esprimeblas tristo de vagviro!
La rosgutoj perlas sur la vest' aŭtuna,
Super la herbejo flugas jam lampiro.
Ankaŭ al la sun' kaj luno venos fino
Kaj ĉiel' kaj ter' forvelkon ne evitos.
La cikado kantas sur la verda pino,
Ĉu la maljuniĝon de la arb' ĝi vidos?
Ne mensogo ja—la ŝtono de l' saĝuloj,
Tamen de blinduloj vanas serĉo plua.
Kaj vi ĉiuj ja ne estas miljaruloj,
Ne malofte plendas vi pri morto frua!
Drinku, el jadrkruĉo poste en ĝin saltu!
Vin enfermu tie kaj vi bone fartu!*

Tradukis S. J. Zee

LAMPO

DUM LA PRINTEMPA FESTO, maljunulino el la kamparo diris al mi ĝojmiene: "En la vilaĝo ni jam havas elektrajn lampojn. Dum mia vivo de pli ol sepdek jaroj, mi eĉ neniam songis pri tia bonaĵo!" Mi, kiu en la nokto ĉiam vivas sub la elektra lampo, ne trovas en ĝi ion aparte novan. Sed, el ŝia ĝojo oni povas dedukti, ke kun la elektra lampo certe aperis multe da novaĵoj en ŝia vilaĝo. Estas supozeble, ke la materiala vivo de ŝiaj samvilaĝanoj senĉese pliboniĝas. Kaj tio rememorigis al mi kelkajn pasintaĵojn.

Mi naskiĝis en urbeto, kiu estis, kvankam nur iom pli ol tridek liojn for de Suĝoŭ, tamen loko relative postrestinta. Kvinonon de mia vivo mi pasigis nokte sub lampo kolzolea. En mia infanaĝo, mian legadon akompanadis soleca lampo, kies flameto estis malgranda kiel grajno de pizo. Mia patrino, kudrante, rakontis al mi historiojn kiaj "la Avino Flameto" kaj similaj, kiuj forigis mian dormemon kaj rapide min refreŝigis. Mia patro priskribis al mi la diligentan lernadon de antikvuloj dirante, ke ili, pro manko de lampo, boris truon en la muro por profiti la lamplumon de la najbaro, aŭ, en somera nokto, utiligis la lumeton de lampiroj metitaj en gaza saketo, aŭ legis vintre ĉe la neĝo, kiu briletis en la nokto. Mi duon-



Somera Komenco.

Lignogravuraĵo de Liu Nian

kredis liajn vortojn, pensante, ke probable ili trovis fortan intereson en la libroj kaj pro tio tiel diligente legadis, sed miaflanke, mi trovis nenion interesan en ili. Poste, mi skribadis sub la lampo novelojn kiujn mi sendis al ĵurnaloj por akiri etan sumon da honorario. Tiam mi rememoris pri mia patro, kiu siatempe rompis al si la kapon super la tablo, skribante *baguven*-ojn* kaj porekzamenajn poemojn** kun la celo ricevi stipendion de Zijang-instituto kaj Ĝengji-instituto. La epoko, en kiu mi vivis, estis malsama ol tiu de mia patro, sed similaj estis niaj statoj. La lampo, intence-neintence, kondukis min paŝon post paŝo al legado kaj verkado, kiuj estis por mi ŝajne interesaj ŝajne neinteresaj.

En la unua jaro de mia studado en Caŭkiaŭ-mezlernejo, en la urbo Suĝoŭ, nokte mi memlernis sub petrola lampo, kiu, nature, estis multe pli luma ol la lampo kolzolea. Oni diris, ke tiam en Suĝoŭ jam estis elektraj lampoj, kies elektro venis el la Ĝenĝing-a Elektrolampa Kompanio, funkciigata de japanoj. La suĝoŭ-anoj, volante repreni la ekspluatitan rajton, bojkotis la kompanion, kaj en iuj vendejoj oni lumigis per kandeloj; ilia volo estis tre firma. En la sekvinta jaro, la suĝoŭ-anoj venkis en sia batalado; ili mem establis la Suĝoŭ-an Elektran Kompanion, kiu aĉetis kaj transprenis al si la kompanion Ĝenĝing. Tiam ankaŭ Caŭkiaŭ-mezlernejo ŝanĝis siajn petrolajn lampojn per elektraj.

Estas certe, ke la elektra lampo simbolas "civilizacian" en hele iluminata sennokta urbo. Sed dum la Kontraŭjapana Rezistmilito, pro aeratakoj la lumigado estis kontrolata, la elektra lampo estis ĉirkaŭkovrita per nigra tuko, kaj ifoje oni simple ĉesigis la provizadon de elektro; tiam reaperis la petrola lampo, kaj eĉ ankaŭ la antaŭlonge forlasita lampo kolzolea. La lamplumo fariĝis pala, eĉ malgaje pala.

Malgraŭ ke la elektra lampo brilas kiel la taglumo, la nokta vivo de ĵurnala redaktisto restas ĉagrena kaj naŭza. Viŝante al si la lacajn palpebrojn, oni devas persiste labori per tondilo, gluaĵo kaj ruĝa inko. Krom la multa okupateco kaj streĉeco, la forta lamplumo incitas la nervojn, tiel ke oni des pli ne povas trovi trankvilecon. La nenormalaj laborhoroj kontraŭas nature al la homa vivkutimo. Cetere, en la pasinta tempo, la korespondaĵoj, kiuj venis al la redaktisto de ĉiuj partoj de la lando, estis plenaj de mallumaj informoj, kiuj konfuzis kaj dolorigis la kapon, ne kiel nun kiam amase alflugas ĝojigaj novaĵoj kaj bonaj artikoloj, kiuj, post prilaboro kaj kunordigo,

* Traktatoj verkitaj laŭ difinita formo speciale uzata en la ŝtataj ekzamenoj ekde Ming-dinastio.

** Aparta formo de poemo uzata en tiuj ekzamenoj.

fariĝis kvazaŭ multakolora bukedo, kaj kiujn oni pre-
sigas por provizi la vastan legantaron per spirita
nutraĵo kaj trovas en tio grandan kontentiĝon. La
lampo, kun la pasado de la historio, naskas malsamajn
sentojn en la homoj.

Iuj amikoj ŝatas verki sub lampo. Laŭ ili, en la
silento de la profunda nokto la pensoj facile kon-
centriĝas kaj fluas senĉese kvazaŭ silko tirata el
kokono; oni ankaŭ povas ĝisfunde cerbumi por poluri
sian skribaĵon pesante ĉiujn vortojn kaj frazojn. La
lampo lumigas la vojon al ilia inspiro. Kutimiĝinte
al nokta laboro, en la tago ili sentas sin ĝenataj de
diversaj embarasaĵoj kaj senordaj pensoj, de kiuj
ili ne povas sin liberigi. Iam mi kutimis skribi ĝis
noktomezo. Se iu paragrafo ne estis finita, mi ofte
ankoraŭ cerbumis kuŝante sur la lito, aŭ eĉ volis re-
surmeti la vestojn kaj leviĝi por daŭrigi la skribadon
ĝis la fino, kvazaŭ timante ke la pensoj forflugos post
la nokto. Sed la kutimo estas ŝanĝebla; nun mi jam
min korektis.

Kvankam senĉese ŝanĝiĝis tiel la materialo de la
lampo, evoluinte de argilo, bronzo, porcelano ĝis stano,
kiel ĝia strukturo, ĝi tamen sensanĝe uzis dum miloj
da jaroj la oleojn de kolzo, sojfabo, arakido, koton-
semo kaj sezamo. Kun la enstrudiĝo de la monopola
kapitalismo, venis en Ĉinion la petrolo, gasa kaj elek-
tra lampoj. La nova ĉiam anstataŭas la malnovan,
la postiĝintaĵo finfine devas esti forselektita. Tiun
ĉi leĝon ne povas eviti ankaŭ la lampo. Tamen, en
Jen-an, la sankta loko de la revolucio, nia gvidanto
de la revolucio skribis sub sezamolea lampo grandajn
verkojn, kiuj orientas la ĉinan revolucion. La lamp-
lumo estis malforta, sed la skribaĵo brile radias,
lumigante la vastan teron. En la Muzeo de Ĉina
Revolucio estas ekspoziciata lampo de sezamoleo, kiu,
kvankam kun meĉo ne bruligita, aspektas ankoraŭ
hele lumanta. De tio oni ankaŭ pensas pri la ver-
kistoj de la pasinta tempo, kiuj skribis monumentajn
ĉefverkojn same sub lampo de kolzoleo. Kion ni povos
skribi hodiaŭ, sub la multe pli luma elektra lampo?
Jen demando pensiga.

La lampo kreas kvietecon. En la vasta silento
de la nokto, kiam oni sidas ĉe lampo, tiu ĉi fariĝas
la plej intima kunulo. La lampo, kiu lumigas post

la subiro de la suno, faciligas nian legadon kaj
skribadon. La lampo ludas la saman rolon kiel la
suno. Sed, estas tempo kiam la suno senfortiĝas,
dum la lampo forpelas la mallumon ĉu en bona aŭ
malbona vetero, ĉu en vento aŭ pluvo. Kvankam
ni ne povas diri, ke la lampo estas io dividanta kun
ni la vivsorton, ĝi estas tamen nia plej intima amiko,
kiu bone scias niajn travivaĵojn, kiel la dolĉajn tiel
ankaŭ la amarajn.

La lampo prezentas la vivon de ĉiu homo kaj
ankaŭ spegulas la socian fizionomion de ĉiu epoko.
Ĝi lumigis por la senhonte diboĉaj monarkoj dum
ilia orgio tra la nokto. Ĝi lumigis por la fidelaj,
honestaj ŝtataloj, kiuj "justecon portis sur siaj ŝtalaj
ŝultroj kaj kritikojn skribis per fera mano", dum
ilia skribado de akuzo pri perfida kortegano. Ĝi
lumigis por la militantaj soldatoj dum ilia nokta
batalado. Ĝi lumigis por vidvinoj dum ilia nokta
ŝpinado. Ĝi lumigis por la nokta preĝo en temploj,
por la nokta irado en dezertecaj vilaĝoj, por la
tranoktado de vojaĝantoj en gastejo. Ĝi lumigis por
la malsama vivo de ĉiuj. Sed la diversaj pasintaĵoj
fariĝis nur objektoj por rememoro. Nun, antaŭ la
festotaga pordego Tian-anmen, la lumkolonoj brilas
por la kantantoj kaj dancantoj de diversaj nacioj de
nia lando. En la Granda Popola Halo, la luksaj lam-
poj, sennombraj kiel la steloj kaj helbrilaj kiel la
luno, lumigas por la tostado kaj huraado de la festen-
antoj, junaj kaj maljunaj. Se mi tion rakontos al
la vilaĝa maljunulino, estos por ŝi vere io neniam
sonĝita. La lampo estas feliĉa en la nova Ĉinio; kaj
la homoj sub la hodiaŭaj lampoj estas ankoraŭ pli
feliĉaj.



KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

KOLEKTO DE FAKSIMILOJ DE ĈINA GRAVURA PRESARTO

Lasttempe la Eldonejo de His-
toriaj Kulturaj Objektoj eldonis
*Kolekton de Faksimiloj de Ĉina
Gravura Presarto*, kiu respegulas
la historian disvolviĝon de la pre-
sarto de Ĉinio. La tuta kolekto
konsistas el ok grandaj volumoj.

En ĝi troviĝas pli ol 660 faksimiloj
el 500 libroj de elitaj gravuraj
eldonoj de Tang- ĝis King-dinas-
tioj (t.e. 618-1911 p.K.). Ili povas
esti dividitaj en jenajn tri kate-
goriojn: ksilografiaĵoj, tipografi-
aĵoj kaj lignogravuraj bildoj. El
ili troviĝas la plej valoraj libroj
ksilografie presitaj en dinastioj de

Tang ĝis Song, t.e. en la jaroj 618-
1279 p.K. Tiu ĉi kolekto estas
sufiĉe kompleta bilda kroniko de
la gravura presarto de Ĉinio. Ĝi
ne nur respegulas la grandan
atingon de la ĉina kulturo, sed
ankaŭ multe helpas al studado
kaj disvolvado de la tradicia,
formriĉa gravura arto.

Intimaj Amikoj de la Legantoj

— Notoj pri la Ĉefurba Biblioteko —


AŬGUSTA MATENO. Sur la placo antaŭ la Ĉefurba Biblioteko en Pekino staras aŭto en kiun oni estis metantaj amasojn da libroj. Inter tiuj libroj troviĝas *Aboco pri Uzado kaj Muntado de Elektro-motoro* kaj *Fundamentaj Principoj de Elektra Tekniko*, kiujn oni bezonas por referenco dum konstruo de putoj kun elektropumpilo en la kamparo. *Scioj pri Dren-irigacia Mekanika Tekniko* kaj *Aboco de Irigaciado*, necesaj por agrikulturaj teknikistoj de produktaj brigadoj, kaj ankaŭ noveloj, rakontoj kaj aliaj literaturajoj, kiujn ŝatas legi gejunuloj en la vilaĝoj. Jen la aŭto ekkuris for portante la "spiritan nutraĵon" de la biblioteko al la legantoj en la ĉirkaŭurbo. Jen estas sceno en la komenco de unu labortago de la Ĉefurba Biblioteko.

La biblioteko situas en la antaŭa Imperia Universitato, konstruita en Juan-dinastio, kiu havas jam historion de pli ol sescent jaroj. Ĝi estis la sola, plej alta studejo de la tuta lando dum la tri dinastioj: Juan, Ming kaj King, en kiu studis en- kaj eksterlandaj studentoj. Ĉirkaŭ ĉi tiu aro de antikvaj konstruaĵoj, staras pinoj kaj cipresoj kun aĝo de centoj da jaroj, kiuj per la abundaj branĉoj kaj folioj dense ombras la tutan terenon, kie regas plena kvieteco. Kiam mi enpaŝis la portalon kun la surskribo "Kolektiĝejo de Saĝuloj", mi rimarkis ke ĝin en- kaj el-iras junaj gelernantoj, maljunuloj kun arĝentaj haroj, gelaboristoj kaj geoficistoj. La libraro de la biblioteko, nombranta pli ol milionon da ekzempleroj, liveras riĉan materialon por lernado kaj studado de la legantoj.

Antaŭ la servotablo troviĝas ne malmultaj vizitantoj, kiuj alvenas ridetante kaj foriras kontente. Inter ili sintrovas ankaŭ gejunuloj el la ĉirkaŭurbo malofte vizitantaj al la biblioteko. Unu el tiuj legantoj estas Tan Ŝihjue de la produkt-brigado en Nanjuan. Lia nova plantaĵo per inokulado de kukurbo al kukumo jam sukcese travivis la eksperimentadon al ĝiaj tri generacioj kaj nun li bezonas lerni kiel

estradi la teorion pri evoluado de la bonspeciaj semoj. Li petis helpon de la Ĉefurba Biblioteko, kaj ĝiaj laborantoj tuj klopodis trovi por li referencajn legajojn por solvi lian malfacilon. Tan Ŝihjue estas mezlerneja diplomito reveninta al sia hejmvilaĝo por partopreni agrikulturan produktadon. Unuflanke li lernadas la metion ĉe maljunaj terkulturistoj, kaj samtempe sin dediĉas al legado por akiri sciojn pri agrikulturo. Ekde 1957 li legis pli ol cent librojn prunte prenitajn el la biblioteko pri agrikultura biologio kaj nun li ja havas fortan inklinon al Miĉurina biologio.

Ĉiufoje kiam la laborantoj de ĉi tiu biblioteko iras por sendi librojn al la kamparo, se nur la vojo estas en la sama direkto, ili ĉiuokaze vizitas ankaŭ Tan Ŝihjue por iom rigardi lian eksperimentan kamparon, kaj samtempe alporti al li la referencajn materialojn, kiujn li bezonas por la eksperimentado. Kiam oni ne povas aŭtomobile sendi la bezonatajn librojn en la ĝusta tempo al la vastaj legantoj en la vilaĝoj, la bibliotekistoj ilin ekspedas do per bicikloj rekte al la komunumoj kaj produkt-brigadoj en la ĉirkaŭurbo. La vojo irita de ili en unu tago estas ofte pli ol kvindek kilometrojn longa. En la unua duono de la pasinta jaro, la libroj, pruntedonitaj de la Ĉefurba Biblioteko al la vilaĝaj legantoj, nombras jam sesdek sep mil volumojn.



Ĉe la Granda Muro.

Lignogravuraĵo de Liu Kuang

Sur la skribotablo de multaj bibliotekistoj kuŝas varmaj leteroj de legantoj, dankantaj ilian helpon, aŭ petantaj novajn helpojn. Eĉ por respondo al plej ordinaraj demandoj de la leganto, la bibliotekistoj senescepte klopodas trovi por ili fidindajn referencajn materialojn. Por la bezono de la legantoj, la bibliotekistoj ne malofte iras serĉi de unu librotenejo al alia; eĉ por trovi ian tabelon aŭ foton, ili volonte faras grandan klopodon serĉadi en la maro de libroj. De januaro ĝis junio en la pasinta jaro ili sinsekve liveris ĉ. okcent librojn por helpi la solvon de pli ol cent fakdemandoj, al tridek ok fabrikoj kaj uzinoj, nome, la Tria Ilmaŝina Fabriko de Pekino, la Motorcikla Fabriko, Guanghua Ligno-fabriko ktp.

De la Ĉefurba Biblioteko ricevis helpojn ankaŭ studentoj de la ĉina klasika literaturo, arkeologoj, komercaj laborantoj kaj multaj geinstruistoj, scienculoj kaj gelernantoj.

Multaj junaj legantoj, pro ricevado de helpoj de la bibliotekistoj, rigardas ilin kiel intimajn amikojn. Iuj el la lernantoj, ĵus sciinte ke ili sukcesis en la enira ekzameno de pli altgrada lernejo, tuj donas la ĝojigan informon al la bibliotekistoj. Kaj multaj aliaj personoj rimarkante ke la bibliotekistoj estas tre okupataj de la laboroj, memvole ilin helpas; kaj en feriaj tagoj, alvenas ofte fervoraj legantoj por fari servon en la biblioteko.

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KUR

UNUA VOĈDONADO EN TIBETO

En multaj lokoj de Tibeto ĉe la bazaj administraj unuoj okazis en lasta oktobro voĉdonado por elekti deputitojn al la lokaj popolaj konsiloj kaj lokaj popolaj registaroj. Tio estas la unua voĉdonado tiuspeca en Tibeto en la historio. Antaŭ tio, demokratia reformo kaj nuligo de servutula sistemo jam estis efektivitaj.

La voĉdonado okazis sub la gvidado de la Komitato de Voĉdonado fondita jam en 1961, sub la estrado de Panĉen Erdeni.

Pli ol 80% el la elektitaj deputitoj de la popolaj konsiloj estis antaŭe sklavoj kaj servutuloj.

Plenan rajton en la voĉdonado ĝuas ankaŭ la sklavo-posedantoj kaj iliaj agentoj, kiuj ne partoprenis la ribelon en 1959. Ili do rajtas ne nur voĉdoni sed ankaŭ esti elektitaj.

Kaj plenan rajton ĝuas ankaŭ tiuj, kiuj partoprenis la ribelon en 1959, sed poste kapitulacis kaj fariĝis leĝobservemaj civitanoj.

INTERHELPADO DE TIBETAJ KAMPARANOJ

Post ricevo de siaj propraj terporcioj, tirbrutoj kaj agrikulturaj

instrumentoj, la tibetaj kamparanoj komencis sin organizi ekde 1960 por agrikultura produktado. Laŭ statistiko, ĝis lasta novembro, pli ol 22,000 interhelpaj agrikulturaj grupoj estas organizitaj, t.e. pli ol 90% el la tibetaj kamparanoj surpaŝis la vojon de kolektiviĝo en agrikultura produktado. Interhelpa grupo montris grandan avantaĝon en grandigado de la kultura areo, akvokonserva konstruado, plibonigo de grundo kaj batalado kontraŭ malfavoraj veteroj ktp.

PUTFARADO DE GEOLOGISTOJ POR KOMUNUMOJ

Ĝis novembro, 1962, pli ol 2,000 geologiaj teknikistoj entreprenis putfaradon per drilaj maŝinoj por popolaj komunumoj ĉirkaŭ Pekino kaj en 8 provincoj norde de Jangzi-rievro. Ĉiuj distriktoj elektitaj por grandskala putfarado estas abundproduktejoj de grenoj, kotono kaj aliaj industriaj plantoj. Pliaj teknikistoj por tiu ĉi celo estas trejnataj.

FAMA ĈINA PORCELANO REPRODUKTITA

Longkjuan-porcelano produktita en Ĉinio estis fame konata en multaj landoj ekde la 13-a jarcento. Ĝi estis unu el la kvin famaj

specoj de porcelano produktita en Song-dinastio (960-1279 p. K.). Tial oni ofte ĝin nomis Song-porcelano.

La korpo de tia porcelano estas griz-blanka kaj ekstere ĝi estas kovrita per tavolo da diafana glazuro varianta de griz-verdo kaj blu-verdo ĝis mar-verdo kaj herb-verdo. Ankaŭ la desegnoj sur la porcelano estas variaj. Ili estas gravuritaj, ĉizitaj aŭ mulditaj.

Jam en la 17-a jarcento ĉesis produktado de tia porcelano. Ekde 1958, ĝi estis revivigita helpate de la popola registaro.

Nun ĉirkaŭ 400 diversaj specoj de tiaj porcelanaj produktoj, inkluzive vazojn, tasojn kaj multajn objektojn de la manĝilaro, produktiĝas, kaj 160 specoj el ili estas imitajoj de Song-porcelanajoj.



En Miljara Tombo



Murpentraĵo en la tombo de Princino Jongtaj.

Foto de Hinhua

EN LA KOMENCO de 1962, la grandioza tombo de princino Jongtaj de Tang-dinastio (618-907 p. K.) estas prifosita en Kian-gubernio, Ŝenhi-provinco.

Princino Jongtaj nomiĝis Li Hianhuj. Ŝi estis la sesa filino de la imperiestro Ĝongzong (Li Ĝe) kaj nepino de Vu Zetian (624-705 p. K.), la fama imperiestrino en ĉina historio.

La fosado de la tombo de Princino Jongtaj komenciĝis en aŭgusto de 1960 kaj finiĝis nur komence de 1962 pro tio, ke la tombodomo estas treege ampleksa kun pli ol mil restaĵoj kaj grandaj freskoj. Nun la elfositaj kulturaj

objektoj estas sub ordigado kaj studado de arkeologoj.

La tombodomo dividiĝas en antaŭa kaj malantaŭa ĉambroj. Inkluzive de la galerio kaj koridoro, kiuj situas antaŭ la ĉambroj, ĝi entute longas 87 metrojn. La galerio havas ses lukojn kaj po kvar malgrandaj niĉoj ambaŭflanke. En la ok niĉoj troviĝas multegaj koloraj fajencaj homfiguroj, rajdistoj, 3-koloraj ĉevaloj kaj objektoj por ĉiutaga uzado. Inter la fajencaj statuoj estas dancistinoj, servistinoj, ĉevalistoj, gardistoj k.s. Ĉiuj figuroj simbolas la sekvantaron ĉe elveturado kaj servistinaron de la Princino dum ŝia vivo. La vestoj de la argilaj

statuoj estas en tre brilaj koloroj. Precipe la kostumoj de la servistinoj estas lukse belaj. Tre variaj estas la pozoj de la argilaj homfiguroj: dancistino dancas gracie, rajdisto galopigas la ĉevalon kun vipo levata — vere interese. La koloro kaj glaceo de multaj 3-koloraj fajencaĵoj kaj porcelanaĵoj estas tiel brilaj kvazaŭ ili estus nove bakitaj, kio montras la altan nivelon de la fajenca metiarto de Tang-dinastio.

En la antaŭa ĉambro staras epitafostono de la princino kaj en la malantaŭa troviĝas ŝia ĉerko. La ligna ĉerko jam putriĝis, tamen la ŝtona ĉerkujo restas ankoraŭ sendifekta. Ĝi estas 3.9 metrojn longa, 2.3 m. alta kaj 2.8 m. larĝa. Interne kaj ekstere de la ŝtona ĉerkujo estas gravuritaj 34 bildoj en linioj, kun temoj de homoj, floroj, birdoj, bestoj k.a. Sur unu el la liniaj bildoj estas prezentita junulino sin amuzanta kun birdeto kiun ŝi bredas, kaj apude staras alia knabino kiu alrigardas tute absorbite. La homfiguroj en tiu ĉi bildo ne nur havas gracian teniĝon sed ankaŭ vivecan mienon. Alia bildo prezentas fraŭlinon kun ŝalo malvolvata per ambaŭ manoj, verŝajne ŝi estas tie dancanta kaj kantanta!

Sed kio plej altiris la atenton de rigardantoj, estas la multaj grandaj koloraj freskoj en la koridoro kaj la ĉambroj de la tombo. Sur ambaŭ muroj flanke de la koridoro estas po du vicoj da freskoj etendiĝantaj unu super la alia. Oni pentris krom bluj drakoj kaj blankaj tigroj ankaŭ kolonojn de kavaliroj kiel akompanantaroj kondukataj respektive de la homoj en purpura, ruĝa kaj verda roboj. Tiuj ĉi kavaliroj ĉiuj havas nigran molan ĉapon kaj orumitan glavon ĉe la talio.

La lastaj du kavaliroj kondukas koloran bonrasan ĉevalon. Ili majeste viciĝas malsupre de du dometaĝoj kaj la bretoj de armiloj. La strekado de la freskoj estas flua kaj forta kaj tre bone esprimas la bravecon de la kavaliroj en la epoko de la prospera periodo de Tang-dinastio (t. e. la unua duono de la 8a j. c.).

Sur la muroj de la antaŭa kaj malantaŭa tomboĉambroj estas pentritaj geservistoj kaj konstruajtoj de palaco ktp. Sur la orienta kaj okcidenta muroj de la antaŭa ĉambro troviĝas po unu fresko kun dimensio de 1.8 × 1.8 metroj pri la palaca vivo de Tang-dinastio. La unua figuro sur la orienta muro estas junulino kaj tiu de la okcidenta muro — versajne nobelino. Ili ambaŭ havas altan hartuberon kaj ŝalonojn sur sia ŝultroj, dekoltan ruĝan silkveston kaj karmezinan jupon kun trenejo ĝistere. Tute kviete

kaj malrapide ili paŝas kaj ĉiu kondukas aron da servistinoj en luksaj vestoj kiuj estas prezentitaj aŭ profile aŭ tutvizaĝe kun viveca interligiteco kaj tenantaj respektive teleron, kandeligon, manĝaĵujon, kalikon, ĵuji-on*, rondan ventumilon, viŝilon k.t.p. en siaj manoj. La kompono de la pentraĵo estas perfekta, aranĝo ĝusta kaj linioj simplaj kaj belaj.

Sur ambaŭ muroj de la galerio interliganta la antaŭan kaj malantaŭan tomboĉambrojn estas simetrie pentritaj homoj, floroj, herboj kaj ĝardenaj ŝtonblokoj. Sur ties plafono pentriĝis aro da blankaj grupoj flugantaj en koloraj nuboj. Sur la voĉo de ambaŭ ĉambroj estas bildoj de stelaroj. Oriente de la lazura firmamento estas flamo ruĝa suno en kiu staras ora koko kun etenditaj flugiloj; kaj okcidente pendas la pura hela luno, en kiu konturiĝas

3-koloraj fajencaĵoj elfositaj el la tombo.

Foto de Hinhua



(Daŭrigo de p. 29)


iu estas de pafvundoj, kaj aliaj — de brulvundo. Li diris: "La operacio estis ĉiuokaze multe pli facile eltenebla ol tiuj ĉi vundoj." Mi pretervole ekrigardis liajn brilantajn okulojn, kaj mi tute komprenis.

Kaj jen, post kelkaj jaroj, ankaŭ mi malfeliĉe suferis pulman tuberkulozon, kaj fine operacio estis neevitebla. Mi ne scias, kiel mi, alie, povus kuraĝigi min alfronti tiujn malfacilaĵojn, ĉar mi estas tre sentema al doloro, kaj sole la traĥeskopian ekzamenon mi jam ne povus elteni. Sed penso pri la respektinda armeano, kiun mi iam konis, min kuraĝigis. Ĉiam

kiam mi preskaŭ ne povis elteni la suferon, liaj brilantaj okuloj ekflagris antaŭ mi, kuraĝigante min supervenki la grandegan doloron por ne perdi la kuraĝon. Restas sur mia brusto cikatro je pli ol unu futo longa; unu el la ripoj estis tute forigita; kaj kelkaj aliaj parte detranĉitaj. Sed ĉio pasis glate.

Mi kredas ke neniu ajn malfacilo aŭ sufero jam povos embarasi min estonte.

Estas vere ke mi redonis al la revolucia armeano la sanon, sed li havigis al mi la kuraĝon. Nu, ja kiu el ni pli meritas la nomon de kuracisto? Mi vere ne povas respondi.



3-koloraj fajencaĵaj statuoj el la tombo. Foto de Hinhua

lunarko, malantaŭ la suno kaj la luno kuŝas ruĝaj montoj kaj inter ili zigzagas la lakta vojo kaj blankaj steloj dissemiĝas plene en la ĉielo.

La prifosado de la tombo de Princino Jongtaj estas granda kontribuo al arkeologio. La elterigitaj objektoj klare respegulas la brilan kulturon de la prospera periodo de Tang-dinastio de Ĉinio kaj ĝi liveris valorajn materialojn por studo de tiamaj kulturo, arto, palaca vivo kaj sociaj moroj k. c.

* *Juji-o*: ornamaĵo kaj simbolo de feliĉo el oro aŭ jado kun kapo skulptita en formo de orkidefloro aŭ nubo.

Ĝu Ĉongmoŭ:

Post la Solokoncerto

ESTAS JAM profunda nokto. Starante en la deka etaĝo de Gingiang-hotelo en Ŝanhajo mi fikse rigardas eksteren tra la fenestro. Sur la stratoj regas plena kvieto, kaj trembrilas nur la multkoloraj neonlumoj. La homoj kiuj svarmis antaŭ kelkaj horoj antaŭ la muzikhalo por

ŝance akiri biletojn hazarde transvendatajn de aliuloj, la varma aplaŭdo de la aŭskultantoj en la halo, la intima prizorgo de la gvidantaj kamaradoj, la instigo kaj gratulo de miaj kolegoj kaj antaŭuloj kaj la salutaj telegramoj unu post alia venintaj el Pekino, Kantono kaj aliaj lokoj . . . ĉio ĉi ankoraŭ ege ekscitas min, kaj samtempe vekas mian profundan rememoron.

La unuan fojon mi okazigis solokoncerton antaŭ 18 jaroj en Ĉunkino — la milittempa ĉefurbo dum Kuomintang-regado. Tiam iuj muzikamantaj amikoj konsilis al mi fari prezentadon, por iom solvi la malfacilojn de mia vivtenado. Sekve mi klopodis prunti monon por subaĉete akiri la permeson de koncerna instanco; kaj mi ĉie petis helpon por disvendi la biletojn, lui pianon kaj prunti kostumon por la prezentado. Tiaj preparaj laboroj min tute lacigis jam antaŭ la prezentado. Pro manko de loko fari voĉekzercadon mi nur povis stari ĉe kruta deklivo de la strato, kaj utiligi la okazojn de motorbruego de aŭtobusoj dum ilia suprenrampado, por min ekzerci en gamoj. Mian voĉon kompreneble ne aŭdis la pasantoj, estis malfacile ĝin aŭdi eĉ por mi mem — mi nur sentis vibron de la laringo. Kiam mi devis kanti sur la scenejo, mi jam estis tre laca, kaj post la prezentado mi sentis kvazaŭ mi estus travivinta vivmortan lukton. Tiuvespere mi enspezis sumon egalan al la monata salajro de malaltranga oficisto. Pro eksciteco mi pasigis la tutan nokton maldorme. En la sekvinta tago mi decidis viziti kinejon kaj restoracion, sed dum aĉetado de bileto, la tuta sumo estis forŝtelita. Kiam mi palpe trovis la poŝon malplena, mi preskaŭ svenis pro ĉagreno kaj reveninte mian loĝejon, mi falis malsana.

La duan fojon mia prezentado okazis en Ĉengduo. Tiam iu mia bona amiko havis parencon, kiu estis bankisto en Ĉengduo. Opiniante ke la bankisto helpos min, li veturis kun mi de Ĉunkino al Ĉengduo, sed rezulte mi ricevis de la bankisto nur malestimon.

Tamen feliĉe la studentaj societoj de kelkaj universitatoj helpis min disvendi la biletojn kaj lui unu preĝejon por la prezentado. Tamen antaŭ la komenco de la prezentado la preĝejo denove min ĝenis postulate pli da pago. Pro tio mi fariĝis plena de indigno, kiam mi kantis la unuan programeron, la "Freŝverdaj Folioj" de Handel, kaj tio mirigis iujn aŭskultantojn, kiuj bone konis la verkon. Fakte, mi ne konsciis kion mi kantis. Tio ankoraŭ ne estis la fino, la kuomintanga imposta oficejo per anonco devigis min ĉesigi la prezentadon en la sekvinta tago pro ke mi ne subaĉetis ĝin laŭ ĝia rutino. Fine mi devis konfesi min kulpa, peti ilian pardonon, kaj pagi punmonon.

Post la venko de la Rezistmilito kontraŭ Japanio, mi kun bela revo intencis provi mian sorton en kelkaj grandaj urboj de la lando, sed ĉie mi spertis nur ripeton de la pasintaj okazaĵoj. Rememorante la tagojn, en kiuj mia tuta animo sentis malhonoron pro humiliĝo, mi decidis ne plu doni solokoncerton dum mia tuta vivo.

Kvankam pasis jam 18 jaroj, sed ĉio ĉi restas tiel klara en mia memoro, kvazaŭ ili estus okazintaj nur hieraŭ. Sed kiel malsama estas la nuna situacio ol la antaŭa!

En la pasinteco, tiujn solokoncertojn mi okazigis nur por solvi mian vivtenan malfacilon, sed la nunan, tute malsame, por akceli la prosperon de solokanta arto. Iam antaŭe, kiam mi vizitis Ĉengduon por prepari la prezentadon en akompano de mia amiko, ni loĝis en malgranda gastejo, en la malhela lampolumo ni sidis unu kontraŭ la alia kun malgaja mieno, kaj ĉagreniĝis pro malfacileco elvendi la biletojn. Nun mi ĵus revenis kun multaj favoroj de la aŭskultantoj kaj de la literatura kaj arta rondoj, de la unuaklasa muzikhalo en Ŝanhajo al tiu ĉi luksa granda hotelo, en kiu loĝi povis nur burokretoj kaj kapitalistoj antaŭ la Liberiĝo, kaj aŭskultis tra telefono kion la administranto de la teatro proponis pri daŭrigo de mia prezentado, laŭ la postulo de la voĉmuzik-amantoj. En la pasinteco mi devis ŝtele fari voĉekzercon sur strato kiel vaganto antaŭ la prezentado; sed nun mi hejme povas sidi ĉe piano, kaj kune kun la kamarado de muzika akompano droni en artostudo. Post unufoja prezento antaŭ 18 jaroj mi ricevis de la kuomintanga registaro la malpermeson kaj monpunon; sed nuntempe tuj post la solokoncerto mi jam ricevis kuraĝigojn kaj gratulojn de la gvidantaj kamaradoj.

Kvieta estas la nokto. Ĉion ĉi ĝi atestas kaj tion al mi rememorigas.

Pentraĵoj
de
Pan Tiansou



Pino kaj Aglo

Sovaĝaj Floroj de Jandang-monto





歐陽修蘇山序



柳谷圖

一灣新水

綠深兩

台斜陽山

外山竹三

人家徑小佳

聲

一抱衣襟上雲間

甲午三月 柳谷 畫



Bambua Valo

Skizoj pri Junnan-provinco

Nokto de Hiŝuangbanna

Jen la kvar murojn miajn dek tri lacertoj gardas,
kaj kokineaj* floroj fenestren enrigardas,
la tuta kort' baniĝas en pluvo de lunlumo,
ĉe mia kapkuseno — flugiloj mil en zumo.

Pizangaj foliegoj jen kovras plene l' teron,
rapirkanabaj lancoj trapikas la ĉielon,
Lancang-rivero ĵonglas kurante kun fervoro,
la spaco plenpleniĝas je flora bonodoro.

Tamtamoj sen ripozo la feston rekomendas,
ĉielen flugi pafe fajraĵoj nun atendas.
Ĉe la bambukabano la fluto ne plu kveras —
en sonĝo de l' ĉasisto or-cerva par' aperas.



* Kokineo (*Musa coccinea*), planto simila al pizango sed kun pli belaj floroj.

Jigjuanhong

La brakoj — ondoj mildaj,
talio — silke svelta,
okuloj — ho, bolidaj,
lipparo — parolpreta.

Jen venas pavo bela el Lancang-aj ondoj
por trovi veran amon en la homa mondo.
Dum l' Akvoversa Fest' knabina kantosono
celebras riĉrikolton de l' Limregiono.

Jen bambu-flutoj trilas kaj tamtamo bruas,
la haroj nube ŝvebas, l' jupo onde fluas.



Jen sub banjano* granda homamaso svarmas,
ĉar danco de Jigjuanhong** gracimove ĉarmas.

* *Ficus wightiana*, specio de granda subtropika arbo kun radikoj pendantaj de la branĉoj (angle: *banyan*).
** Jigjuanhong estas membrino de la Ansemblo de la Taj-nacia Aŭtonoma Subregiono de Hiŝuangbanna. Ŝi estis multe aplaŭdata dum sia prezentado de "Pavodanco", "Jilajhan" kaj aliaj dancoj kune kun aliaj geartistoj.

Ŝali

Kun perloj kaj arĝentoj por ornamo
jen Ŝali nin regalas per kantĉarmo.
Ho, kiom ŝi belamas kiel ajni-o,
kaj kiel dolĉe kantas kun pasio!

La novajn kantojn sekvas tradiciaj,
sonoras ili unuj post aliaj.
Subite Ŝali haltas kaj hezitas,
ĉe rekomenc' la brovoj kuntiritas.

La kant' apenaŭ aĝas je jarseso,
sed sonas jam centjara laŭ impresio.
Ŝi kantas singultante kaj plorĝemas,
pri ŝia vivo la rakonto temas.

Naskiĝis ŝi orfino jam senpatra,
al bienul' vendiĝis ses-monata.
Kaj servis ankaŭ la patrin' servute
ĉe l' mastro, kvankam ŝia frat' entute.

KURACISTO

IAM MI LABORIS kiel ĥirurgo, kvankam nur dum mallonga tempo, tamen tio donis al mi okazojn kontakti kiel kuracisto kun diversaj personoj. Ŝajne oni estas pli malkaŝemaj antaŭ kuracistoj, tial mi povis rimarki ne nur iliajn diversajn malsanojn, sed ankaŭ iliajn diferencajn sintenojn, kun kiuj ili frontis al la suferado. Iuj estis ridindaj, aliaj estis respektindaj aŭ eĉ neforgeseblaj.

Iun posttagmezon, ĉe la tempo kiam preskaŭ finiĝis nia deĵortempo, alvenis "paciento", kies fortika korpo pensigis al mi kaj ekzercantaj medicinaj studentoj, ke li ne povas esti serioze malsana. Sed li plendis ke li ne vivos longe, ĉar li ĉiam ellasas sangon dum fekado. Mi pensis ke tio eble estas kaŭzita de ordinara hemoroidoj. Post ekzameno, pruviĝis ke li havis

malgrandan t.n. hemoroidan kernon, sed tio neniel endangerigos lian vivon. Mi diris al li, ke kaŭzoj de tiu ĉi malsano estas multaj, sed ĝi pliboniĝos, se oni faros pli multe da korpa agado, kaj operaciado estas ne necesa, sed la paciento malkonsentis kaj insistis pri radikala kuracado. Kiel kuracisto, ni ĉiam plenumas laŭeble la deziron de paciento. Por diri la veron, ni estis iomete malsataj, sed ankoraŭ ni devis fari operacion por li. Dum la operacio, li kriegis senĉese, kvankam ni uzis sufiĉe da anestezilo.

Fine la operacio finiĝis, sed ĝuste tiam alia paciento estis enportita. Estis jam malfrue, kaj ni estis malsataj kaj lacaj. Tamen, la devo de kuracistoj estas helpi kaj savi suferantojn, ni ne povis rifuzi helpodonon.

*Apenaŭ kiam estis ŝi kvar-jara,
formortis ankaŭ la patrino kara.
De tiam havas ŝi la nomon Ŝali
kun la signifo: morne orfe stari.*

*Brullignon, akvon poste ŝi ekportis,
la ŝarĝoj ŝiajn ŝultrojn, brakojn mordis.
Bovpaŝtis ŝi vidinte nur sep jarojn,
travagis nudpiede ĉiujn valojn.*

*La viv' kaj tradici' ŝin kapabligis
kantadi improvize, sed ŝin pikis
geknaboj, malgraŭ kantoĝuo, per mokaĵo:
"Ŝali sabado, a mi na ka ŝo . . .!"**

*Ne elteneblis la riĉul-barbaro,
ŝi fuĝis kaj sin kaŝis en montaro.
Simile al cerveto vage ŝi sin trenis
kaj herb' kaj sovaĝfruktoj ŝin vivtenis.*

*"Enviis mi, ke l' bambuid' kitelon
surhavas, kaj la areknukso ŝelon.
L' ajni-aj malriĉuloj tre mizeris,
sed mi el ĉiuj tamen plej suferis.*

*"Por mi orfin' la arboj kaj la rokoj
Similis ja al patro kaj patrino,
sed mutis ili ĉiam al la voko
faritaj de mi en ripet' sen fino."*

*Tra l' vangoj de Ŝali larmfluoj kuris,
kaj ankaŭ l' aŭskultantojn trist' torturis.
El rememoroj ĉiuj nun eliras,—
en la kultura domo lampoj brilas.*

*Kiam ekiris la reform' agrara,
Ali apenaŭ aĝis dekkvin-jara.*

*Ŝi verŝis el si sian vivamaron
kaj partoprenis verve klasbatalon.*

*Publike ŝi paroli ne scipovis.
"Do kantu!" kuraĝigi oni provis.
Aŭdinte l' kanton ĉiuj eklarmadis,
kiujn antaŭe skurĝo torturbatis.*



Levinte la flavan vatitan litkovrilon, ni trovis ke la paciento estas revolucia armeano, ekstreme malgrasa kaj malforta. El la hospitala registro kiun li kunportis, ni sciis, ke li partoprenis en revolucia aktivado ekde 1928 kaj nelonge post tio li ekhavis pulman tuberkulozon. La radiografiaĵo montris ke lia pulmo jam havas multajn kavojn.

Laŭ regulo, ni unue faris traĥeskopian ekzamenon pri li. Malfeliĉe, tiu-speca ekzameno estas la plej suferiga, ĉar por fari tion, oni devas enmeti tra la gorgo en la traĥeon latunan tubeton kun malgranda elektra lampo kaj reflektilo. Ĉiu scias ke la traĥeo toleras nenion en si. Eĉ ĉe enflugo de iom da polvo, tuj okazas tuso. Tial ni ĉiuj estis maltrankvilaj pro tiu ĉi malgrasa kaj malforta malsanulo. Krome, mi havas la taskon kulturi novajn kuracistojn, tial mi devis lasi ankaŭ la ekzercantajn studentojn rigardi tra la tubeto. Kun bedaŭro mi klarigis al li la signifon elkulturi novajn kuracistojn por nia lando kun grandnombra popolo kaj prove demandis, ĉu li povas elteni iom pli longan daŭron de la ekzamenado. Li nur fermis la okulojn kaj kapjesis. Kiam mi metis

la instrumenton en lian traĥeon, li ne nur ne kriis, sed eĉ faris nenian ekscesan reagon. Li nur tenis firme la manon de unu studento. Post la ekzameno, kiam ni helpis lin sidiĝi, li kraĉis multan sang-ŝaŭmon.

“Vi eltenis brave,” diris al li la flegistino.

Palpebrumis liaj klaraj okuloj, kaj li iom movetis siajn busangulojn. Mi pensis ke ĉiu ajn kiu vidis tiun lian mienon kvazaŭ ridetan, neniam forgesos ĝin. Li aspektis, kvazaŭ la netolerebla sufero kiun neniu povas facile elteni, ne estus okazinta ĉe li, sed la postsignoj de la sufero evidente restis. Tiam neniu el ni rimarkis ke la nokto jam profundiĝis.

Kelkajn tagojn poste, ni faris operacion al lia brusto, por detranĉi la tutan difektitan parton de la pulmo. Kian novan suferon li devis trasperti dum la operacio, estas kompreneble neimagebla por iu sanulo, sed li ĉion eltenis. Foje dum babilado mi demandis lin, de kie li akiris sian senkomparan eltenpovon, li ne tuj respondis, sed malrapide montris al mi kelkajn aliajn cikatrojn. Mi trovis, ke inter ili

(Daŭrigo sur p. 21)

*Sed la knabino, kiu ĉe ni sidas,
fariĝis nun jam hom' malsama:
ŝi tiel multe kantas, kore ridas,
kaj estas tiel vigla, tiel sana.*

*Ŝi lernas legi kaj pri la Partio,
por bone servi al sia nacio.
Kaj ĉiuj en Ginghong, Menghaj asertas,
ke ankaŭ en kantado Ŝali lertas.*

* Ŝali diris al la verkinto, ke antaŭ la Liberiĝo geknaboj en tiu loko mokis ŝin per versaĵo laŭdante samtempe ŝian talenton en kantado. La ĉi tie cititaj estas la unuaj du versoj, kiuj signifas proksimume: Ŝali scipovas kanti kaj estas tre sagaca, ĉar ŝi manĝas fekaĵon de kato.

Cidonio


*Aroma
simile al burĝon' de floro,
malvarma
simile al la fontlikvoro,
miela,
ke ĝi ĝuigas ĝis ebrio.
La piro estas bela—
sed grandas ja dekoble pli la cidonio.*

*Post disflorado en printempo
aŭtune fruktoj ekaperas,
sed nur solfoje en jartempo.
Ĉe l' cidoni'— alio veras:
eĉ kelkdek-foje fruktojn ĝi liveras!*

*Jen verdaj,
flavaj,
molaj
kaj sukhavaj*

*Nun gastoj venas—
jen fruktojn oni tuj deprenas
de sur la arb' kaj en bambu-loĝio
regalas kun pasio
pli dolĉa ol la cidonio.*

Trad. **Laŭlum**



La Argilaj Statuetoj el Hujŝan

HUJŜAN estas pitoreska loko en Vuhi-gubernio, Giangsu-provinco, sude de Jangzi-rivero. Sed Hujŝan famiĝis ne pro sia bela pejzaĝo, sed pro sia loka metiartaĵo — argilaj statuetoj.

Laŭdire la produktado de tiuj metiartaĵoj en Hujŝan jam havas historion de pli ol 400 jaroj. La plej fama statueto estis tiu de grasa infaneto, nomata *Da Afu*. Kaj krome tiuj de *Tigro*, *Knabineto* k.a.. ankaŭ estis tre ŝatataj de infanoj. Tiuj statuetoj sin karakterizas per viveco kaj sereneco en plastiko, kaj intenseco kaj heleco en koloroj. Komence ilin produktis kamparanoj dum senokupaj tempoj en terkulturado kiel flankajn produktadojn kaj ilin vendis en foiroj okaze de pilgrimadoj, ŝtataj ekzamenoj kaj kokonrikoltoj. Kaj poste la okupo iom post iom fariĝis memstara tradicia metiarto.

Nuntempe la temoj de la argilaj modlaĵoj de Hujŝan estas multvariaj, tamen forme ĉefe ankoraŭ estas homfiguroj.

Depost 1912, krom la ludiloj kaj pupoj, esprimantaj la kuraĝecon, optimismom kaj sopiron al feliĉo, aperis ankaŭ verkoj kun temoj satirantaj militaristojn, naciperfidulojn, koruptitajn oficistojn kaj imperiistojn. Ekzemple, la populara modlaĵo *Oficistaĉo* estis korpulenta homfiguro kun groteska mieno kaj

humilaĉe fleksitaj membroj, kaj sur ties kukurboforma kapo malĝustaloke sidas oficista ĉapo kun la du flugiloj* ridinde superturnitaj. Per tiu ĉi figuro la aŭtoro moke ridindigis la tiutempajn regantojn, kiuj sin humiligis antaŭ la imperiistoj kaj kruele subpremis la popolon en la lando.

Laŭdire, la modlado de multkoloraj dramaj figuroj komenciĝis en la mezo de la 16-a j.c., kaj en la 19-a j.c. la famaj metiartistoj Ding Agin kaj Ĝoŭ Aŝeng evoluigis tiun arton al nova pinto. La de ili modlitaj statuetoj distingiĝis per viveco en plastiko



Historio de Pli ol Du Mil Jaroj

LA ŜAŬHING-A RIZBRANDO estas unu el la ok famaj alkoholaĵoj en Ĉinio. Ĝia produktado komenciĝis en tempo tiel frua kiel antaŭ pli ol du mil jaroj, nome la epoko de la Militantaj Regnoj. Ĝi estis plurfoje notita en antikvaj libroj de Ĉinio.

Dum Liang-dinastio en la sesa jarcento la Ŝaŭhing-a rizbrando jam disvendiĝis ĝis tre malproksimaj lokoj. Tiam, kiel skribite, la dolĉa vino el Ŝanjin (alinomo de Ŝaŭhing) en arĝentaj boteloj estis jam fame konata. La imperiestro Hiaŭji de Liang-dinastio skribis en sia poemo ke kiam li legis librojn dum juneco, li kutime apudmetis arĝentan botelon da dolĉa vino el Ŝanjin, kaj trinkis de tempo al tempo dum legado.

Ĝoŭ Fejtang:

En Tang-dinastio la Ŝaŭhing-a rizbrando kaj Penglaj-a brando** estis notitaj en la *Libro pri Vino*. En la longe pasintaj dinastioj la brando "Aroma Neĝo" el Ŝaŭhing estis grava oferdonajo. La vino "Ora Medalo" farita de la vinfarejoj de Ŝen Jonghe kaj Kian Jucuj (Mo-gi) akiris respektive la honoran diplomon kaj specialan oran medalon de la Nanjang-a Industria Ekspozicio, en la jaro 1910.

Mirinda Lagakvo

La Ŝaŭhing-a rizvino karakteriziĝas per klara flava koloro, forta agrabla bonodoro kaj dolĉa

La Ŝaŭhing-a

gusto. Spertuloj en ĝuado de alkoholaĵoj diras, ke la Ŝaŭhing-a rizbrando estas tre gustoriĉa. Post kiam oni glitigas ĝin tra la gorgo, ĝiaj gustoj agrable tiklas la nervojn. Kial ĝi estas tiel gustoriĉa? "Kie produktiĝas fama vino, tie troviĝas bona fonto" — ĉe Ŝaŭhing sin trovas la "spegulo-lago". Ĉar la Ŝaŭhing-a rizbrando estas zorgeme farita el blanka glueca rizo, tritika fermento kaj akvo de la lago, tial oni ankaŭ ofte ĝin titolas per la "Fama Brande de Spegulo-lago".

La akvo de la lago "Spegulo" devenas de la montĉeno Kuajji.

kaj klareco de karaktero, tiel ke ili similas al la veraj dramfiguroj forme kaj spirite.

Dum la Kontraŭjapana Rezistmilito la metiarto de hujŝanaj modlajoj suferis gravegan detruadon faritan de japanaj invadintoj. Kaj poste la regado de la kuomintangaj reakciuloj alportis al ĝi redukton de produktado kaj dekadencan tendencon en kreado. Post 1949, kiam la tuta lando estis liberigita, por disvolvi tiun tradician arton la loka kultura instanco fondis la Instituton pri Kreado de Hujŝanaj Argil-modlajoj de Giansu-provinco. La instituto kolektas kaj studas la malnovajn verkojn kaj sur bazo de tio faras novan kreadon kaj helpas al la metiartistoj en ilia metio. Samtempe multaj metiartistoj estas pogrupe sendataj por studi en la Orientĉinia Filio de la Centra Instituto de Belarto. Ĉio ĉi tio antaŭkondiĉas favore por plia levo de la artnivelo de hujŝanaj koloraj modlajoj.

Nun en la Argil-modlaja Manufakturo de Hujŝan laboras ĉ. 800 laboristoj kaj oficistoj. Tie produktiĝas ĉiumonate ĉ. 500,000 argil-modlajoj. El la produktitaj specoj estas kaj kopioj de malnovaj verkoj kaj novaj nuntempaj homfiguroj. Krom la dramaj figuroj kaj dramaj maskoj en serioj estas ankaŭ novaj verkoj, kiaj *Kolektado de Tritikaj Spikoj*, *Rikolto de Vinberoj*, *Herbofalĉado por la Komunumo* k.a., kiuj spegulas la nunan realan vivon. Cetere estas produktitaj ankaŭ diversaj edukaj, medicinaj, irigacimekani-kaj k.a. modeloj kaj objektoj.

La metiarto de hujŝanaj koloraj modlajoj estas nun sur la vojo al pliprosperejo.

* Flugiloj estas nomo de la ornamajoj de malnovtempaj oficistaj kapvestoj, horizontale eletenditaj ambaŭflanke.



Rizbrando *

Ĝi filtriĝas tra tavoloj de ŝtonoj kaj sableroj tiel ke ĝi ne nur purigas, sed ankaŭ alprenas al si malgrandan kvanton da mineralo. Tial la laga akvo estas pura, klara kaj neŭtra, enhavanta iom da mineralo, kiel kalcia salo, magnezia salo ktp., kaj ĉio ĉi konvenas por fari alkoholaĵon.

Nuntempe dum farado de la vino en vintro, ĉiuj vinfarejoj boate ĉerpas akvon el la centro de la spegulo-lago ekster la suda pordego de la urbo. Poeto de Juan-dinastio tion prikantis jene:

*Rapidas ŝipoj kaj ŝipetoj
Ŝaŭhing-aj kiel teks-navedoj.*

La Rizbrando por Filino

Kial la Ŝaŭhing-a rizbrando ankaŭ estas nomata "Malnova Brando"? Ĉar "ju pli malfreŝa, des pli bonodora", kaj "ju pli longtempa, des pli bona" ĝi estas. Unu el la plej malfreŝaj specoj portas la nomon "Huadiaŭ", kaj alinomiĝas "Vino por Filino". Antaŭe en Ŝaŭhing, estis jena kutimo: unu monaton post la naskiĝo de filino, la gepatroj elektas kelkajn vazojn da bona vino, subtere konservas en vazoj ornamitaj per koloraj desegnoj kaj argilaj modlajoj de herooj el Ŝaŭhing-a aŭ Pekina operoj. Kiam edziniĝas la filino, tiam oni elfosas ilin por regali parencojn kaj amikojn, aŭ kiel doton portas post la festonita palankeno por la nov-edzino al la domo de la edzo, akompanate de muzikistoj. Ĉar

tia rizbrando estas konservita longtempe, tial ĝi havas fortan bonodoron, tre klaran koloron kaj estas trinkajo bonega. Antaŭ ne longe, al diversaj nomoj laŭ la fabrikmarkoj de la bona vino "Huadiaŭ", krom la tradiciaj famaj vinoj "Aroma Neĝo", "Bambufolie Verda", "Guang Juan Hong", ktp. ankaŭ aldoniĝas multe da novaj famaj produktoj kiuj povas doni novan ĝuon al la trinkantoj. Ekzemple, kiam vi malŝtopas la botelon de la osman-ta rizbrando, tuj kaptas vin la agrabla bonodoro de osmantofloro.

* *Vino farita en Ŝaŭhing de Ĝegiang-provinco.*

** *Penglaj estas gubernio en Ŝandong-provinco.*



Luŝeng-o

LA blovinstrumento luŝeng-o konsistanta ĉefe el longaj bambuaj tubetoj, kun langeto estas bona amiko de la Mjau-nacianoj de Gujĝoŭ-provinco. Tie, oni tiel diras: “Estas malfacile por junulo akiri amon de fraŭlino, se li ne scipovas ludi aŭ ne bone ĝin ludi.”

En grandaj festotagoj kiaj la sepa tago de la tria monato, la mezo de la sepa monato kaj Grena Festo en la naŭa monato, luŝeng-danco estas la plej populara programero. En multaj regionoj oni simple nomas ĉi tiujn tri festotagojn luŝeng-festoj. Dum la festotago, la luŝeng-dancejo estas plenplena de homoj, kaj granda fervoro tie regas, kiam muzikas kaj vigle sin movas la junuloj kaj dancas kaj kantas la fraŭlinoj. En Gulong kaj Guli, de Gujĝoŭ-provinco, la partoprenantoj en la danco ofte nombriĝas almenaŭ pli ol mil, kaj iam eĉ pli ol dekmil. Ne nur la lokaj luŝeng-ludistoj venas amase, sed iuj el najbaraj distriktoj pli ol cent liojn for de la ludejo, rapidas tien por prezenti sian arton.

Post laboro, aŭ en okazo de geedziĝo aŭ funebro, luŝeng-ludo estas nemankebla aktivado por la mjau-oj. En la baseno de Kingsujĝiang-rivero, sudoriente de Gujĝoŭ-provinco, en ĉiu mjau-a vilaĝo estas centra placo, kiu ser-

vas kiel luŝeng-dancejo. En lunlumaj noktoj de somero aŭ aŭtuno, aŭdinte la sonon de luŝeng-o, ĉiuj, ĉu maljunuloj, ĉu virinoj, ĉu buboĵoj, kolektiĝas por dancado aŭ babilado, ĝuante senlime la postlaboran plezuron.

La mjau-aj junuloj havas specialan sentimenton al luŝeng-o. Kiam li rendevuas kun fraŭlino, luŝeng-o fariĝas lia Hongniang*; kaj kiam li esprimas sian amon, ĝi helpas lin per sia mirinda lingvo. Ofte okazas, ke brodante sub lampo, malantaŭ fermita fenestro, fraŭlino subite saltleviĝas ĉe la familiara sono de luŝeng-o, eliras tra la lunlumo kaj rapidas al la direkto, de kie venas la luŝeng-muziko.

La mjau-oj rigardas luŝeng-on kiel sian intiman amikon kaj bonan akompananton. Tamen, en malnova Ĉinio, same kiel sia mastro, la muzikilo estis malestimata kaj mistraktata de la reakciaj regantoj. Timante ke la mjau-oj sin organizos kaj ribelos kontraŭ ili, kun luŝeng-danco kiel ŝirmilo, la feŭdaj regintoj de la King-dinastio kaj la reakciula kliko de Kuomintango krude malpermesis la luŝeng-ludon. Kiam la regantoj vilaĝon post vilaĝo serĉis kaj konfiskis luŝeng-ojn, la mjau-oj ilin enfosis en teron. Sed tuj kiam foriris la persekutantoj, ili elprenis siajn muzikilojn kaj

ludis denove. En la 50-aj ĝis la 80-aj jaroj de la 19-a jarcento, en la ribelo kontraŭ King-dinastio, gvidita de la mjau-a heroo Ĝang Hiŭmej, luŝeng-o fariĝis la “klariono” por la antaŭenmarŝo, instigante la ribelantojn al kuraĝa luktado.

Post la Liberiĝo, la heredado kaj disvolvo de la kulturo kaj arto de la nacimalplimulto estas subtenataj kaj bone prizorgataj. Regule okazis koncertoj de popolaj muzikiloj, en kiuj oni ankaŭ enkondukis kaj diskonigis luŝeng-on. En la Aŭtonomaj Regionoj de Mjau- kaj Dung-nacioj, sudoriente de Gujĝoŭ-provinco, kie loĝas la mjau-oj, oni eĉ starigis luŝeng-produktan kooperativon, kiu fabrikas ekskluzive luŝeng-ojn por la frataj nacioj.

Luŝeng-o similas al la ŝeng-o de han-nacio, escepte de la blovtubo. Luŝeng-o antaŭe farita en Gujĝoŭ-provinco havis nur 6 aŭ 8 son-tubetojn kaj povis produkti nur ses aŭ ok malsamajn muziknotojn. La grandeco, tembro, sonintenseco kaj tonalo de luŝeng-o diferencas en malsamaj regionoj. Estas bassona luŝeng-o, kiu altas pli ol dek futojn, kaj la altpiĉa, kiu nur estas alta je du aŭ tri futoj. Sed en la pasinta tempo, la registro de luŝeng-o estis kompare mallarĝa, per ĝi oni nur povis ludi simplajn melodiojn. Nun la Ensemblo de Gujĝoŭ-provinco jam reformis ĝin en 8, 11 aŭ 12 tubetajn. La registro de tiaj luŝeng-oj estas pli ampleksa kaj iliaj tonaloj pli variaj ol antaŭe. Krome, oni planas plue plibeligi la tembron de la muzikilo.

* *Servoknabino en la fama dramo “La Okcidenta Ĉambro”, kiu ludis la rolon de svatantino inter la juna instruitulo Ĝang kaj f-ino Jingjing.*



Demando pri Fiŝado

Antaŭ pli ol du mil jaroj en Lu-regno estis guberniestro nomata Vu Maki, kiu tre deziris fari ion bonan al sia popolo. Multajn ordonojn kaj severajn regulojn li donis, sed tute vane. Informiĝinte pri bona regado de Fu Zigian, estro de alia gubernio Ŝanfu, li decidis tien iri por esplorvojaĝi inkognite. Li alivestis sin ordinara popolano, iris en tiun gubernion kaj vidis maljunulon fiŝhokanta ĉe rivero.

“Avo, kial vi prenas nur la grandajn kaj rejetas la fiŝetojn en la akvon?” demandis Vu post kelktempa observado.

“Ĉar Fu Zigian diris, ke estas pli bone ilin preni por manĝo post kiam ili plenkreskos.”

“Ĉu li ordonis al vi tiel fari?”

“Kial do necesas ordoni?” diris mirigite la maljunulo. “Pravas lia diro, do volonte ĉiuj ĝin observas.”

JUS APERIS

NOVELOJ de LUSIN

la plej famaj noveloj el ĉina moderna literaturo de la plej eminenta verkisto de Ĉinio

13 × 21 cm. 464 paĝoj kun 28 belaj ilustraĵoj kaj fortika bindo.

Prezo: Rb. 1.61, Us\$ 1.80, £0-12-9,
Gld. 6.75, steloj 25

Mendu tuj ĉe:

niaj landaj perantoj
aŭ nia Administracio

KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ * KURANTAJ AFEROJ *

IRIGACIO ĈE LA GRANDA DEZERTO DE ĈINIO

La nord-okcidento de Ĉinio estas konata kiel regiono kun tre malalta pluvokvanto. La jara pluvokvanto tie ne superas 100 m.m., dume la forvaporigo sub la arda suno estas tre multa. Tial tie la agrikulturo dependas ĉefe de irigacio per akvo de kelkaj riveroj kaj la degelinta neĝo sur la Tianŝan-montaro. Por tio jam en antikveco tie disvolviĝis irigacia sistemo kun multaj kanaloj kaj fosajoj. Sed la sistemo estis farita senplane kaj multaj kanaloj kaj fosajoj estas grave obstrukcitaj de ŝlimo.

Nun la antikva irigacia sistemo estas renovigita kaj plibonigita de la popolaj komunumoj kaj ŝtataj farmoj ĉirkaŭ la plej granda oazo ĉe la plej granda dezerto en Nord-okcidenta Ĉinio. Kaj dank' al tio ĉirkaŭ 400,000 hektaroj da agro estas irigacieblaj. Ekzemple, en Kaŝgar la

kultura areo kvaroble pligrandiĝis depost la Liberiĝo en 1949, kaj 20% pli grandigita en la lastaj kvar jaroj post kiam fondiĝis tie popolaj komunumoj en 1958.

La regiono fariĝis nun jam granda provizanto de grenoj kaj kotono en la Hingiang-a Ujgura Aŭtonoma Regiono.

LA UNUA INFANA KONKURSO DE VEJĈI-LUDO

De la 14-a ĝis la 23-a de lasta oktobro okazis la unuan fojon en Ĉinio inter-urba infana konkurso de vejĉi-ludo, la tradicia antikva ĉina ŝako. Tiu ĉi speco de ŝakludo en Ĉinio havas jam pli ol 3000-jaran historion. Ĝi estas ludata de du personoj per blankaj kaj nigraj ŝakopecoj sur ŝaktabelo kun 361 kruciĝoj formitaj de 19 horizontaj kaj 19 vertikalaj linioj.

Partoprenis en la konkurso 29 knaboj kaj 12 knabinoj. Ili ĉiuj

estis venkintoj de la lokaj vejĉi-konkursoj en Kantono, Ŝanhajo, Pekino kaj aliaj urboj.

En la konkurso de la knaboj 8-ĝis 11-jaraĝaj venkis Fan Ĉiulin el Ŝanhajo. Li estas 11-jara lernanto de iu elementa lernejo. Li gajnis 11 ludojn el la 12. Sed li komencis lerni la ludon antaŭ nur du jaroj. Krome, li sin ekzercis nur en la semajnfino, ĉar en la aliaj tagoj li devas sin dediĉi al lernejaj taskoj kaj aliaj ludoj.

En la knabina grupo venkis 15-jara Vu Ĉuansuj el Hefeĵ, Anhuĵ-provinco. Ŝi venkis en ĉiuj 11 ludoj, kiujn ŝi partoprenis.

En la grupo de 12- ĝis 15-jaraĝaj knaboj, la ĉampiono estas Vang Junan, ankaŭ el Hefeĵ.

Dume la konkursintoj faris ankaŭ piknikon, boat-remadon, kaj ĉeestis aliajn sportajn ludojn.

Baŭ Ĉangfa:

Ĉipaŭ-o — Robo Ŝatata de Ĉinaj Virinoj

La virinaj vestoj ĉiam variigas siajn fasonojn, sed en Ĉinio inter la variemaj fasonoj troviĝas unu speco de tradicia kostumo — la ĉipaŭ-o, kiu restas plej vaste portita kaj havas plej longan historion.

En la komenco, ĉipaŭ-o estis la nacia kostumo de manĉuaj virinoj. En la 20-aj jaroj de ĉi tiu jarcento virinoj de la han-a kaj aliaj nacioj en Ĉinio komencis vesti sin ankaŭ per tiu ĉi speco de robo kaj iom post iom ĝi fariĝis vestaĵo tre populara. Dum la pasintaj jardekoj okazis multaj ŝanĝoj kaj plibonigoj en ĝia fasono, ekz., pri la proporcio inter la longeco de robo kaj la alteco de la virino ĝin portanta, pri la longeco aŭ larĝeco de la manikoj, la pliigo aŭ malpliigo de garnajoj, ktp. Kaj nun ĝi jam akiris formon plej vaste ŝatatan de la ĉinaj virinoj.


Ĉinaj virinoj ŝatas ĉi tiun fasonon ne nur pro tio, ke ĝi havas nacian tradicion de longa pasinteco, sed ankaŭ ĉar ĝi havas avantaĝojn de simpleco, praktikeco, beleco kaj gracieco.

La ĉipaŭ-o estas ĝenerale uzata kiel ĉiutaga vesto kaj ankaŭ kiel kostumo de socia vivo por virinoj.

Tial oni povas vidi virinojn en diversmodaj ĉipaŭ-oj tiel sur stratoj, kiel en lernejoj, teatroj, vesperkunvenoj aŭ ĉe festenoj. Kaj estas rimarkinde, ke portantoj de tiu speco de robo sin limigas nek en aĝoj nek en profesioj. Inter ili estas kaj dekelk-jaraj knabinoj kaj grandaĝaj sinjorinoj. Kompreneble, la koloroj kaj desegnoj de la ŝtofo kaj la formo de la robo varias konforme al la aĝoj, figuroj, socistatoj kaj ŝatoj de la portantoj. Ekz., maljunulinaj ĝenerale vestiĝas per la pli larĝa tipo; dikulinoj elektas ŝtofojn kun vertikalaj strioj aŭ desegno de malgrandaj floroj aŭ ŝtofon en pli malhelaj koloroj.

Alia trajto de la ĉipaŭ-o estas, ke ĝi povas esti farita laŭ malsamaj ekonomiaj statoj kaj laŭ la veteraj kondiĉoj de la sezonoj. Ĝiaj taŭgaj ŝtofoj povas varii de la plej simpla katuno ĝis altkvalita lanaĵo aŭ luksa silko. Kaj laŭ la postulo de sezono, ĝi povas esti kudrita sen aŭ kun subŝtofo, koton-vatita aŭ lan-vatita.

Kompreneble, plibeligo estas ĉiam la ĉefa kondiĉo postulata de la vivirinaj kostumoj. Kaj la ĉipaŭ-o en tiu ĉi rilato tute kontentigas beligecon de virinoj. La



formo de ĉipaŭ-o estas simpla kaj senornama, ne estas komplikita per faldajoj kaj aldonajoj. Tial ĝi plene reliefigas la naturan belecon de la virina korpo, kreante la senton de ĝentileco, svelteco kaj ordemeco. Se oni atentis pri la harmonio de koloroj kaj elekto de desegnoj de ŝtofo, estas eble iomgrade plimildigi certajn naturajn difektojn kaj montri la belecon de la portanto.

Kvankam la ĉipaŭ-o havas la avantaĝon de simpleco, ĝi tamen ne malakceptas taŭgan akcesoraĵon aŭ aldonan veston. Ekz., sur la brusto aŭ randoj de la vesto, oni povas almeti garnajojn aŭ galonojn, kaj ekstere de ĝi, oni ankaŭ povas porti jaketon eŭropan.


“Ekonomio, praktikeco, beleco” estas la gvida principo proponita de modernaj ĉinaj arkitektoj. Versajne, tiu principo ludas la ĉefan rolon ankaŭ en la plibeligo de la vivo de ĉinaj virinoj, kiuj tiel ŝatas la fasonon de ĉipaŭ-o.

Skizo por Eltranĉo kaj Aranĝo de Ŝtofo por Longmanika Ĉipaŭ-o

1. la fronta peco;
2. la dorsa peco;
3. interna refaldpeco;
4. la antaŭa parto de maniko;
5. la malantaŭa parto de maniko;
6. kolumo

Longeco de ŝtofo = longeco de robo + orlo-altonaĵo \times 2

Larĝeco = 0.68 metro



Dia Dono

— *Ujgura Popol-rakonto* —

ANTAŬ TRE TRE LONGA TEMPO vivis maljunulo nomata Dia Dono, kiu kulturis kun sia nepo melonplantojn ĉe la piedo de monteto. Ili ĉiutage laboris diligente sur sia melonkampo, akvumante kaj sarkante. La plantoj kreskis tre bone, kaj ĉiuj, kiuj pasis preter la kampo, admiris kaj laŭdis ilin. Iun tagon, la ĥano preteriris tie kun siaj korteganoj kaj vidis la melonojn.

“Kiom bonaj melonoj!” li diris admire. “Tio estas dia dono kaj mia feliĉo. Mi volas scii, kiu gardas ilin ĉi tie por mi.” La korteganoj tuj venigis la maljunan melonkulturiston.

“Ha, mia kara ĥano, kiel vi fartas?” salutis respekte la maljunulo sin klinante.

“Ĉu estas vi, kiu gardas ĉi tie la melonojn? Ĉu ili jam maturiĝis?”

“Jes, estas mi, kiu zorgas pri ili ĉi tie. Dank’ al Dio, la melonoj jam maturiĝis.”

“Do alprenu al mi kelkajn plej dolĉajn.”

“Bone!” Dia Dono respondis kaj ekiris al la melonkampo. Li baldaŭ revenis kun du grandaj melonoj kaj diris: “Tiu ĉi estas plej bonaj, kara ĥano. Bonvolu gustumi ilin!” Kaj la korteganoj tuj distranĉis la melonojn en pecojn kaj prezentis ilin al la ĥano.

“Vere, vere dolĉaj ili estas!” avide manĝante, la ĥano laŭdis senĉese.

“Ha, mia honestulo, mi ankoraŭ ne informiĝis pri via nomo. Mia popolo estas tro multanombra por ke mi povu scii ĉiujn iliajn nomojn.”

“Efektive, estimata ĥano! Mi estas honestulo. Ĉiuj en ĉi tiu

loko scias, ke mi estas Dia Dono la melonkulturisto.”

“Bonege, vi estas Dia Dono, same kiel la melonoj. La donajoj de Dio ja estas tre multaj. Ĉiuj niaj manĝaĵoj, vestaĵoj kaj aliaj estas diaj donoj. Dank’ al Dio mi manĝis hodiaŭ dolĉegajn melonojn.” Tion dirinte, la ĥano foriris kun siaj korteganoj. La maljunulo ne kuraĝis iel plendi kaj nur reiris al sia kabano malbenante la tagon.

Vespere, kiam lia nepo revenis de la foiro, Dia Dono rakontis al li ĉion, kio okazis en la tago.

La sekvintan tagon, la ĥano denove venis al la melonkampo de Dia Dono kun siaj kromedzinoj kaj korteganoj. Forlasinte la ĉevalojn, ili diskuris al la kampo por elekti kaj deŝiri la plej grandajn melonojn. Tion vidinte, Dia Dono alrapidis kaj kriis:

“Mia nobla ĥano! Bonvolu sidi ĉe la kampo-rando kaj lasu min elekti por vi la plej bonajn melonojn! Vi jam difektos trete la melonplantojn!” Sed neniu atentis lin. Konsternite, la maljunulo vokis sian nepon, sed la lasta estis for. Li povis nur senhelpe rigardi ilin tretantaj la melonplantojn.

Sate manĝinte, la ĥano kaj liaj kromedzinoj ankoraŭ deprenis po du plej grandajn melonojn por forporti. Li ordonis la maljunulon bone

prizorgi por li la nematuriĝintajn melonojn. Sed, kiam la ĥano eliris el la melonkampo kaj volis forraĵdi, li subite ekkriis: “Hej, kie estas niaj ĉevaloj?”

“Via majesto! Dankon al vi pro la kvar ĉevaloj donitaj de Dio kaj alportitaj de vi hodiaŭ. Ni jam ilin buĉis.” Nun alvenis la nepo de Dia Dono kaj diris tion al la ĥano.

“Fripono, kiel vi kuraĝis buĉi miajn ĉevalojn?”

“Ĉu vi ne diris, via majesto, ke niaj manĝaĵoj, vestaĵoj, loĝejoj kaj aliaj, ĉio estas dia dono. La melonoj estas diaj donoj kaj vi jam manĝis ilin laŭvole. Ni polanoj havas nenion por manĝi, tial Dio sendis al ni kvar ĉevalojn pere de vi. Pro tio ni devas danki Dion kaj ankaŭ vin.”

Aŭdante la vortojn de la nepo de Dia Dono, la ĥano estis kaj kolera kaj honta, tiel ke li ne povis rompi sian mutecon por longa tempo. Kaj poste li kolere forjetis teren la du melonojn, kiujn li portis en sia sino, kaj foriris returne.

Ilustraĵo de Huang Gonggjun



La Fadena Ludo




Fig. 1




Fig. 2




Fig. 3





Fig. 4




Fig. 6




Fig. 5




Fig. 7




La 96-a serio de p.m. emisiita (28-XI-1962) de Ĉinio por memorigi la 50-an datrevenon de Sendependiĝo de Albanio.

Monumento de antifaŝisma batalanto kaj mapo de Albanio	1-318 8c.
La nacia standardo kaj infano de Albanio	2-319 10c.

ENKETO PRI TROPIKAJ KRESKAĴOJ

Miloj da diversaj specioj de sovaĝaj sed utilaj kreskaĵoj estas trovitaj en suda Ĉinio post zorga enketo finita en lasta novembro. La enketintoj laboris dek jarojn sur la kampoj kaj du jarojn por studi la kolektitajn materialojn kaj redakti sciencajn raportojn. Ili traveturis la tutan regionon oriente de Fugian-provinco kaj okcidenten ĝis Guanghi-provinco inkluzive Hajnan-insulon. En Guangdong-provinco estas trovitaj 6000 specoj da utilaj sovaĝaj kreskaĵoj, en Guanghi-provinco — 7000, kaj en Fugian-provinco — 2000. Inter ili troviĝas 167 specioj taŭgaj por ole-produkto, 200 specioj riĉaj je amelo kaj fibroj por fabriki bonkvalitajn paperojn. Ankaŭ multaj novaj specioj taŭgaj por trinkaĵo, spico kaj medicina uzado estis trovitaj.

“INSULO DE MUZIK- AMANTOJ”

Tiel oni nomas la insulon Gulangju ĉe la suda mar-bordo de Fugian-provinco, ĉar tie regas vigla etoso muzika.

Sur tiu ĉi insuleto havanta nur 20,000 loĝantojn ofte okazas koncertoj, en kiuj oni povas ĝui muzikon de mondfamaj muzikistoj, tradiciajn ĉinajn instrumentajn muzikaĵojn, nuntempajn revoluciajn kantojn kaj popolajn melodiojn.

La partoprenantoj de tiaj koncertoj estas tre variaj. Oni povas trovi tie laboristojn, fiŝistojn, doktorojn, instruistojn, studentojn kaj dom-mastrinojn. Edzo kaj edzino, patro kaj filo, fratoj kaj fratinoj ofte troviĝas en sama koncerto.

Preskaŭ ĉiuj fabrikoj, institucioj, lernejoj kaj fiŝistaj teamoj havas sian propran ĥoron aŭ orkestron. La tuta membraro atingis 4000.

Familioj de muzik-amantoj ofte aranĝas koncerton en siaj hejmoj.

esperanta eldono

LA LANDLIMA PROBLEMO INTER ĈINIO KAJ HINDIO

eldonis

La Fremdlingva Eldonejo

Pekino

*por tiuj kiuj volas bone informiĝi pri tiu ĉi problemo,
ĝi estas ricevebla de*

**GUOZI SHUDIAN (P. O. BOX 399, Pekino) aŭ LA
ADMINISTRACIO DE ĈEL (P. O. KESTO 313, Pekino)**

La 22-jara junulo Jin Ĉengcong, la dua premiito pro pianludo en la Dua Ĉajkovski-konkurso okazigita en lasta aprilo en Moskvo, kreskis ĝuste en tia familio.

NOVAJ AGRONOMIAJ LIBROJ

Pli ol 80 novaj agronomiaj libroj estas eldonitaj de la Scienca Eldonejo en Ŝanhajo, ekde 1960. Ili temas pri agronomio, sterkado kaj insektoj. Antaŭ la presiĝo la manuskriptoj de tiuj libroj estis detale diskutitaj de sciencaj esplorantoj kaj profesoroj surbaze de multjaraj enketoj en la kamparoj.

Ankaŭ spertaj terkulturistoj estis invititaj por tiu ĉi laboro, ekzemple la famaj tritiko-kulturantoj Ma Tongji kaj Liu Jinghiang en Henan-provinco, la fama riz-kulturanto Ĉen Jongkang en Giangsu-provinco ktp.

En la libro *Songkiang-rizo* oni resumis la spertojn de kamparanoj loĝantaj proksime al Ŝanhajo. 70 diversaj insektoj malutilaj al grenplantoj estas studitaj. Ankaŭ spertoj de legomkulturo estas resumitaj en serio da libretoj.

LA EDUKADO EN INTERNA MONGOLIO

La Aŭtonoma Regiono de Interna Mongolio estas la plej granda paŝta regiono de Ĉinio, sed antaŭ la Liberiĝo en 1949, ĝi estis la plej postrestinta regiono en edukado. Laŭstatistike tiam estis nur 76 elementaj kaj mezaj lernejoj kun 7000 lernantoj por la tuta regiono. Sed post la Liberiĝo la nombro de lernejoj rapide kreskas. Nun tie troviĝas 653 elementaj lernejoj kun 52,000 lernantoj kaj 33 mezlernejoj inkluzive inĝenierajn kaj porinstruistajn lernejojn, kun pli ol 7000 lernantoj. Do la nombro de la lernantoj en la elementaj lernejoj okoble grandiĝis depost la Liberiĝo kaj atingis sesonon de la paŝtistoj.

Ĉiuj lernantoj lernas kaj povas ĝui medicinajn servojn senpage. Subvencioj por manĝaĵoj kaj loĝado estas donitaj al tiuj, kiuj tion bezonas.

La lernolibroj kaj lekcionoj por la elementaj lernejoj ĝis altaj lernejoj estas en la mongola lingvo.

LA EKSPERIMENTA INSTRUADO DE ESPERANTO

en la Geknaba Mezgrada Lernejo de Somero (Suomio)

LA EKSPERIMENTO okazas, laŭ interkonsento kun la Instrua Administracio, tutlanda registara institucio, kiu, sub la Instrua Ministerio, okupiĝas kaj decidas pri ĉiuj praktikaj taskoj rilate al la instruado en Suomiaj lernejoj, simile kiel en aliaj landoj la Instrua ministerio mem. La eksperimento komenciĝis en aŭtuno 1958, kaj la eksperimenta tempo estis fiksita je kvin jaroj. La kvina jaro estas ĵus komencita.

Por ĝuste prijuĝi la eksperimenton kaj ĝiajn rezultojn, kompare kun eventualaj eksperimentoj en aliaj landoj, estas necese memori, ke la lernantoj, alvenante al la lernejo, scias nur la suoman lingvon, kies strukturo kaj vortrezoro funde diferencas de tiuj de la ĝenerale konataj eŭropaj lingvoj, pro kio la akiro de la internacia lingvo, same kiel tiu de alia tn. moderna lingvo ne povas progresi same rapide kiel en aliaj landoj.

Kio koncernas la eksperimenton rilate al la lerno de lingvoj, la plano estas jena: Du paralelaj samnivelaj linioj studas lingvojn germanan, esperantan kaj svedan tiel, ke la linio B komencas studi la germanan de la unua klaso kaj la svedan de la tria, dum la C-linio komencas per esperanto en la unua klaso, alprenas la

germanan en la dua kaj la svedan en la tria klaso. Per esperanto ĝi daŭrigas de la dua ĝis la kvina studjaro tiel, ke unu aldona fako, ĝis nun geografio (kaj parte desegnado), estas instruata per *esperanto*. La demandoj, al kiuj oni klopodas trovi respondon per la eksperimento, estas: 1. kiel la studado de esperanto progresas, kaj 2. ĉu ĝi helpas aŭ malhelpas la lernadon de germana lingvo.

Ĉi tiu raporto baziĝas sur observoj en kontakto kun vizitoj de la direktoro de Esperanto-Instituto de Finnlando, ŝtatsubtenata institucio, magistro Vilho Setälä, membro de la Akademio de Esperanto, la trian fojon akompanata de lerneja konsilanto Olli Sampola, inspektoro de la instruado de lingvoj en nialandaj lernejoj.

La unua vizito okazis proksime al la fino de la unua (aŭtuna) studsezono. Esperanton oni instruis dum tri monatoj ses lecionojn ĉiusemajne, per interparola metodo. La lernantoj respondis vigle kaj klarbone al instruistaj demandoj, sole aŭ en ĥoro. Ili elparolis bonege. En la ortografio oni trovis eraretojn precipe ĉe la siblaj konsonantoj, kiuj estas tute fremdaj al suomoj. Skribadon ili ja lernis nur sur la nigra tabulo de la klasejo. Ĉe la fino de la leciono la junaj gelernantoj meminciate ekkantis esperantlingve, por ĝojigi sian vizitanton.

Ĉirkaŭ unu jaron poste estis renkontata sama klaso dum geografia leciono. Kiel instruisto funkciis tiam angla fraŭlino Wheatley, kiu tute ne sciis la suoman lingvon. La taga tasko

koncernis resumon de franca geografio, kaj la lernantoj senpene donis klarigojn pri la limoj de la lando, pri naturkondiĉoj, minejoj kaj vivrimedoj. La respondoj tute ne limiĝis al “jes” aŭ “ne”, ili formiĝis el tutaj frazoj. Kiel ekzemplo ni menciunur, ke respondante al demando pri la vivrimedoj de la altebenajanoj la lernanto rakontis, ke la loĝantoj estas dependaj de sekalkulturado kaj ŝafobredado, kaj ke ŝafina lakto estas materialo por Roquefort-fromaĝo. La infanoj uzis eĉ relative maloftajn vortojn — Lazura kaj Cinabra Bordo. Ĝenerala impresio estis, ke la infanoj uzis, ne studis la lingvon. La instrumaterialo estis parte havigita de la lernantoj mem. Ili ja havis eksterlandajn leteramikojn ekde la dua studperiodo.

Eksterlanda korespondado havas altan gravecon. Oni tamen ofte konstatis, ke en tio kaŝiĝas problemoj por la lingvostudenta junularo. Nialanda studento estas en nefavora pozicio, ĉar la ĵus akirita lingvoscio angla aŭ germana ne sufiĉas por normala korespondado — samaĝaj eksterlandanoj, kies gepatra lingvo estas uzata, facile konsideras la korespondadon tro infaneca. Aliflanke nialandaj gejunuloj ne volas korespondi kun multe pli junaj eksterlandanoj. Sekve la iam komencita korespondado formortas.

La studentoj de esperanto estas en alia situacio. La lingvo estas fremda, lernita, por ambaŭ korespondantoj, eĉ la anoj de “malgrandaj” lingvoj ne havas ian malavantaĝan elirpunkton. Ĉar plue estas fakto ke esperanton



oni lernas kontentige per unujara studado, ekzistas ĉiuj antaŭkondiĉoj por inspira korespondado, kiu alportas unuarangajn informojn pri fremdaj landoj kaj plivastigas la mensan horizonton. Plia trajto estas, ke multaj jam plenaĝaj esperantistoj sin proponas al korespondo kun gejunuloj kiel "geonkloj" el fremdaj landoj.

Tute speciala travivaĵo estis por kelkaj lernantoj vizito al internacia infana kongreso. Lernantoj de Somero-a lernejo jam kvarfoje partoprenis tian. Somere 1960 dek du geknaboj vojaĝis kun sia gvidanto en Belgion, kie en Waterloo, kolektiĝis ĉ. okdek malpli ol 14-jaraj esperantistoj el dek landoj. Tie ili restis kune dum unu semajno, interparolante, flegate nur de du belgaj onkloj. Semajnfine estis akcepto, dum kiu kaj la partoprenantoj de Universala Kongreso de Esperanto kaj ĵurnalistoj konatiĝis kun la juna aro kaj ĝuis programon prezentitan de ĝiaj membroj. La programon kronis teatraĵo. Iu juna jugoslavo multe miris, kial la ĵurnalistoj estis ĝis nekredemo impresitaj pri la bona interkompreno de partoprenantaj infanoj tiel diversnaciaj. "Ĝi ja estas tute natura, ĉar ni ĉiuj parolas esperante!"


La tria vizito al Somero printempe 1961 malfermis novajn perspektivojn, kvankam ĝis tiam pasis nur iom pli ol duono de la kvinjara eksperimenta programo. La supremenciita klaso, nun la tria C-klaso, klare plifirmigis sian lingvoscion. Lernanto, kiu estis alvokita al la afrika mapo, kapablis fari prelegeton pri ĉio, kion sciis pri la insuloj de la kontinento, pri ilia naturo kaj loĝantoj. La parolata lingvo estis flua kaj senerara. Estis klare, ke la lernanto ne serĉadis lingvan esprimon por sia temo — kvankam ne ekzistas eĉ esperantlingva geografia lernolibro — sed li diris la aferojn tute nature laŭ la memoro. Se iu alia lernanto ne rakontis egale flue pri la afrikaj

dezertoj, tio evidente ne estis sekvo de manka lingvoscio. Oni ĝoje povis ankaŭ nun konstati, ke la tuta klaso tre vigle sekvis la instruadon.

Sed nun prezentiĝis ankaŭ okazo kompari la studon de germana lingvo en la klasoj B kaj C. Ni ja scias, ke la unuaj estis finontaj sian trian, la duaj nur sian duan jaron de germana studado. Tamen la duaj, la esperantistoj, preskaŭ atingis la unuajn: la saman lecionon ili studis nur *unu tagon* pli malfrue ol la unuaj. Ankaŭ estis tute klare, ke la esperantista klaso pli firme kaptis la studadon. En la klaso B oni eble perceptis ioman malkuraĝon aŭ timon aŭdi sian propran voĉon, kio faris sekavadon de respondoj por eksterulo iom peza, sed la klaso C respondadis laŭte, vigle kaj tute kunvivante. Al ni impresis kvaŭzaŭ tiu ĉi klaso estis pli unueca, ke ĝi kiel tuto, inklude de la plej neevoluintaj lernantoj, kunsekvis.

Estu ankoraŭ dirite, ke ambaŭ klasoj havis saman instruiston de germana, kiu ankaŭ studis esperanton.

Post la observaj lecionoj, dum la diskutado kun la instruistoj, memklare sin prezentis demando, kio povis esti la kaŭzo, ke la esperantostudentoj evidente pli rapide progresis en la studado de la germana lingvo. Ĉu eble hazarde tiu klaso konsistis el pli inteligenta lernantaro ol la alia? La respondo al tio estis, ke la instruistoj opinias ĝenerale la *alian* klason eble iomete pli inteligenta, meze, ol la esperantoklason. Estis nerefutebla fakto, ke la studado de esperanto pozitive influis la studadon de la germana lingvo. Eble la kaŭzo estas tio, ke la simpla strukturo de esperanto faras konversacion jam en frua stadio sencoplana, eble ankaŭ la klara strukturo de la lernita lingvo apogas subkonscie la lernon de aliaj lingvoj. La lernantoj mem diris, ke es-



peranto plifaciligis ellernadon de la germana vortaro.

Kvankam la eksperimento estas nefinita, ni kuraĝas jam nun aserti, ke evidentiĝis:

1. ke esperanto-studoj rapide kondukas al praktika scipovo de tiu ĉi lingvo,
2. ke oni povas akiri tiun ĉi scipovon tute sen perdo de la vidpunkto de aliaj lingvoj — la esperanto-studentoj ja atingis en du jaroj la nivelon akiritan de kompara klaso dum trijara studado, kvankam koncernis germanan lingvon, kies vortaro ne multe koincidas kun la esperanta, kiu plejparte estas latinida,
3. ke per esperanto oni plivigliĝas studadon de geografio, samtempe oni establas translimajn amikecajn rilatojn, kiujn fruktodonaj eksterlandaj vizitoj apogas,
4. ke efektivigo de esperanto-instruado ne estas malfacila. Kiu ajn lingvoinstruisto akiras per kelkmonata liberhora studado kapablon instrui esperanton.

Do, la eksperimento en Somero montras vojon por sencoplana solvo de la lingva problemoj kaj de plievoluigo de interhomaj rilatoj supernaciaj por ĉiam pli vastaj popoltavoloj.

JOEL VILKKI

Rektoro emerita de la lernejo en Somero

VILHO SETÄLÄ

membro de Akademio de Esperanto

Esperanto Marŝas

Zamenhof-festo en Pekino

Por festi la 103-an datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof, je la 16-a de decembro lastjare kunvenis pekinaj geesperantistoj. Interalie partoprenis ankaŭ la E-kursanoj de la Ĉina Popola Universitato. Ili la unuan fojon ĉeestis esperantistan kunvenon, tamen unu el ili faris sufiĉe flue mallongan paroladon en Esperanto por saluti la festan kunvenon. Ĉeestis ankaŭ kelke da malnovaj esperantistoj.

Paroladon pri Zamenhof kaj lia lingvo donis k-do Ilin. Sekvis aliaj paroladoj aŭ pri la lingvistika flanko de la internacia lingvo, aŭ pri ĝia lernado.

Oni atentigis, i. a. ke la modesteco, persisteco kaj pacamo ĉe Zamenhof ĉiam estas sekvindaj por liaj lingvanoj kaj ke internacieco de la radikoj kaj la mirinda vortfarado certigas ĝian evoluon al plena sukceso, ke ĝi fariĝos bazo de la estonta monda lingvo por ĉiuj popoloj.

Ĉe la fino estis projekciita la "Diafilmo pri Budapest" antaŭ nelonge ricevita de niaj hungaraj amikoj.

E-rondoj en Pekino

9 studrondoj fondiĝis antaŭ nelonge en Pekino laŭ la kvartaloj kie la partoprenantoj loĝas. Inter la rondanoj estas geoficistoj, geinstruistoj, gestudentoj kaj aliaj profesiuloj. Ĉiuj ili lernas la internacian lingvon kun entuziasmo kaj viglas en la regule okazanta kunveno por praktikadi parolon en Esperanto kaj studi problemojn de la lingvo. Komuna kunveno de la anoj de la studrondoj okazas ĉiumonate por



interŝanĝi opiniojn pri esperantaj laboroj, spertojn en la lernado, sin amuzi per esperantaj kantoj, muziko, deklamoj k.c.

Reeldoniĝo de Esp-aj Lernolibro kaj Vortaro por Ĉinoj

La unua eldono de la **Elementa Kurso de Esperanto** kompilita de Venlo Fon elĉerpiĝis baldaŭ post ĝia eldoniĝo. Same ankaŭ tiu de la **Nova Vortaro Esperanta-Ĉina**, kompilita de ĈEL. Por kontentigi urĝan bezonon de ĉinaj E-lernantoj, la duaj reviziitaj eldonoj de tiuj du libroj estis eldonitaj ĉe la fino de lasta jaro.

Lokaj E-rondoj Revigliĝas

En pluraj lokoj de Ĉinio nun fondiĝis aŭ revigliĝas E-rondoj. En Hangĝou, la bela urbo en Ĝegiang-provinco, troviĝas nun du E-rondoj. Unu el ili estas formita de 3 instruistoj kaj la alia de 5 lernantoj de la lernejo. La instruista E-rondo gvidata de k-do Ĉen Hingliang, kunvenas vespere ĉiusabate por kolektiva lernado.

Pli ol 10 esperantistoj en Vuhan, la urbotrio de Hubej-provinco, nun denove kolektiĝis en nova E-rondo, gvidata de k-do Ĝu Ŝikang. Regula lernado kaj agadoj por propagando estas planitaj.

Harbino estas urbo en la Nord-oriento de Ĉinio. Ankaŭ tie nun fondiĝis nova E-rondo. Ĝi estas gvidata de k-do Ĝang Jan, biblioteka estro de la Hejlonggiang-provinca Biblioteko. Ili komencis lernadon de la internacia lingvo kaj planis fondi E-biblioteketon.

Esp-aj Kursoj en Indonezio

Kreskanta estas la intereso pri Esperanto en la indonezia junularo. Por ĝin kontentigi, organiziĝis lastjare en Jogjakarta 3 esp-aj kursoj por laboristoj, studentoj kaj infanoj 7- ĝis 12-jaraj. Ili estas gvidataj de s-anoj Yaziz Widjajakusuma, Sri Soedono Pr., Rachman kaj Tho Lie Hian. La instruado okazas de la 9-a ĝis la 12-a horo ĉiudimanche. La kursanoj nombras 60.

Por antaŭenpuŝi la disvastigon de Esperanto oni ankaŭ planas okazigon de la II-a konferenco de Indonezia Esperanto-Asocio kaj esperanta ekspozicio.

Yaziz Widjajakusuma kaj
Sri Soedono Pr. (Indonezio)

Monda Kulturo

Nova internacia revuo kun la supra titolo estas anoncita de UEA. Oni anoncis ke ĝi aperos en aŭtuno, 1962, kun formato sama kiel tiu de la revuo **Esperanto** kaj amplekso de 32 paĝoj. Ŝajne oni intencas per ĝi anstataŭi la kajeron **Belarto** kaj la malaperontan **Nica Literatura Revuo**. Ĝi eldoniĝos kvarfoje en ĉiu jaro. La jarabono kostas 15.-gld. (60 stelojn).

Venis ĝia prospekto, sed ĝis redaktado de tiu ĉi informo, ni ankoraŭ ne ricevis specimenon de ĝi. Ni esperas, ke ĝi vere respegulos la mondan kulturon.

La 4-a Volumo de la "Fabeloj de H. C. Andersen"

La 3 volumoj de la **Fabeloj de Andersen**, tradukitaj de L. L. Zamenhof estas konataj kaj valorataj de ĉiuj esperantistoj. Nun de **Heroldo de Esperanto** ni ricevis ĝojigan informon, ke ĝi eldonos en februaro, la 4-an volumon de tiu ĉi fama traduko Zamenhofa.

Tiu ĉi volumo enhavos 24 fabelojn kaj ampleksos 224 paĝojn. 50 artaj ilustraĵoj estos aldonitaj.

E-movado inter Sciencistoj kaj Medicinistoj en Moskvo

La regula kaj enhance riĉa programo de la Esperanto-sekcio ĉe la Centra Kulturdomo de Medicinistoj en Moskvo ĉiam mirigas la legantojn, ke tiel viglaj estas la esperantistaj sciencistoj kaj medicinistoj en Moskvo. Oni des pli mirigos, informiĝinte, ke la programo efektivigita ne nur estas sed ofte pliriĉigita.

Laŭ informo veninta antaŭ nelonge el Moskvo, tiu ĉi E-sekcio en la dua sezono de pasinta jaro aranĝis du grandajn kunvenojn krom la regulaj renkontiĝoj kaj prelegoj. Unu el ili estis la renkontiĝo kun partoprenintoj de la Tutmonda Kongreso por Ĝenerala Malarmado kaj Paco. Tiu renkontiĝo okazis en la 15-a de lasta julio. Ĝin ĉeestis 20 geesperantistoj el 8 landoj. La moskvaj geesperantistoj salutis la delegitojn de la kongreso kaj ili priparolis la signifon de la kongreso kaj tuŝis ankaŭ la malperfektecon de la samtempa traduko alprenita de la kongreso.

Alia kunveno estis dediĉita al la 75-a jubileo de Esperanto. En la jubilea vespero kolektiĝis pli ol 50 personoj. Troviĝis inter ili ankaŭ gastoj kamarado Nguen Van King el Vjetnamio kaj D-ro Hideo Yagi el Japanio. Oni parolis en la vespero pri naskiĝo de la genia kreaĵo antaŭ 75 jaroj, pri gravaj praktikaj laboroj de la esperantistoj, kaj fine la veterana esperanta poeto G. Deŝkin rakontis pri siaj neforgeseblaj impresoj de la personaj renkontoj kun D-ro L. Zamenhof.

En la regulaj renkontiĝoj partoprenis ne nur moskvaj sciencistaj kaj medicinistaj esperantistoj, sed ankaŭ gesamideanoj el diversaj lokoj de USSR kaj eksterlandaj samideanoj. La temoj de la renkontiĝoj estis ne nur variaj sed ankaŭ sencoplenaj. Ekzemple, la celebros de la grava ruslingva ĵurnalo, "Pravda" fondita de Lenin antaŭ 50 jaroj, diskutoj kaj prelegoj pri maŝintradukado, raporto pri organa ĥemio kaj vivo en la universo, rakonto pri historio de E-movado en Sovetio kaj la nuna grava partopreno de sovetiaj geesperantistoj en la lukto por paco kaj amikeco inter la popoloj k.t.p.

Resumo laŭ informo de T.
Kulagin (Moskvo)

E-ekspozicio en Kaŭnas, Litova SSR

En la unua tago de julio lastjare en Petraŝiŭnai (ĉe Kaŭnas'a HES) Litova SSR, okazis Esperanto-Literatura Ekspozicio organizita de loka studenta konsilantaro en la loĝejo de la studentoj de Politeknika Instituto. En vastega ĉambro estis dismetitaj sur la tabloj diversaj espe-

Pekinaj esperantistoj ĝuas ekskurson ĉe la pitoreska monto Hiangŝan je la 21-a de oktobro.



Efikaj Rimedoj por Amikeco kaj Kultura Interfluo

Depost la reapero de *El Popola Ĉinio* antaŭ pli ol kvin jaroj, multaj el niaj legantoj ne nur rigardas ĝin kiel interesan legaĵon sed ankaŭ utiligas ĝin diversmaniere por amikeco kaj kultura interfluo inter la popoloj. Jen kelkaj el la imitindaj ekzemploj:

En la kunveno de la "kultura vespero" pri Ĉinio s-ano **A. Frangeul** kaj aliaj francaj samideanoj voĉlegis kelkajn artikolojn el *El Popola Ĉinio*.

S-ano **K. Matuba** tradukis el nia gazeto ujugurajn popolkantojn en la japanan lingvon kaj publikigis ilin en japana revuo. En sia letero al ni li diris interalie ke verŝajne estis por la unua fojo ke ujugura literaturajo estis prezentita antaŭ la japana popolo. Li ankaŭ sendis al ni la revuon en kiu aperis lia traduko.

Revuon ankaŭ sendis al ni pola k-do **M. Kossakowski**, kiu aperigis en ĝi artikolon pri ponto bazitan sur materialo en *El Popola Ĉinio*.

Du profesoroj en universitatoj en **Sovetunio** kaj **Usono** utiligis en siaj lekcioj materialojn el nia gazeto. Unu el ili skribis, "En *El Popola Ĉinio* mi trovis ofte interesajn novajn faktojn por miaj prelegoj kaj lekcioj, precipe pri la diversaj nacioj en Ĉinio kaj pri la rapidega

evoluo de via lando." La alia skribis, "Tiu ĉi revuo estas tre interesa kaj mi uzas ĝin kiel instruilon en mia Esp. kurso en kolegio. Miaj studentoj havas tre grandan intereson pri la artikoloj pri via lando kaj ĝia nova vivo."

Angla s-ano **J. Gbourne** skribis, "Mi estas tre feliĉa informi vin ke la ĉef-bibliotekisto en Wolverhampton ĵus akceptis mian proponon meti miajn uzitajn kopiojn de *El Popola Ĉinio* en la tre atestimata 'Lego-ĉambro' de la ĉef-biblioteko."

Precipe meritas mencion nia intima, fervora kunlaboranto, k-do **L. Mladenov de Bulgario**, kiu tradukis dum la pasintaj kelkaj jaroj multe da artikoloj longaj kaj mallongaj el *El Popola Ĉinio* kaj aperigis ilin en diversaj bulgaraj gazetoj. Ĉi tie ni esprimas al li plej korajn dankojn kaj ankaŭ al niaj aliaj kunlaborantoj kiuj utiligis nian gazeton diversmaniere.

Ne estas eble tie ĉi citi ĉiujn nomojn de la legantoj kiuj faris similan laboron. Tiu ĉi laboro sendube estas granda kontribuo al la plivastigo de kultura interfluo kaj al la pliprofundigo de la amikeco inter popoloj de Ĉinio kaj aliaj landoj. Ni atendas ricevi baldaŭ amason da leteroj de niaj amikoj kun similaj informoj.

rantaĵoj, gazetoj, libroj, revuoj, prospektoj, de la diversaj eldonejoj de la mondo.

En la ĉefa angulo de la ĉambro estis portreto de Nia Majstro L. L. Zamenhof, pentrita sur vitro de fama pentristo-portretisto k-do K. Liulevičius. Apud la portreto, estis verda flagego, kaj pli supre surskribo "Bonvenon".

Sur la muroj estis alligitaj paperaĵoj sur kiuj estis multe da belegaj materialoj senditaj el

diversaj landoj de la mondo. Inter ili fotoj, leteroj, leterpapiroj (kolekto), kaj 165 pecoj, sub 13 vitraj kovriloj Esperantoglumarkoj, kaj poŝtmarkoj.

Inter ĉio, estis speciala tablo, sur kiu estis dismetitaj presajoj de la eldono de la Ĉina Esperanto-Ligo, kaj al la vizitintoj estis speciale montrita, kaj klarigita pri ĉiuj atingajoj en la Popola Ĉinio, kaj ankaŭ pri la Esperanto-eldonaĵoj, per kies helpo

oni povas facile kompreni legante ĉinan literaturon en Esperanto. La ekspozicion vizitis pli ol 200 studentoj. Ĝi akceptis ankaŭ gastojn el urbo Kaŭnas, kaj el apudaj loĝlokoj. Ili kun granda intereso rigardis riĉan kolektaĵon de P. Baronas, dum nur kelkaj jaroj.

La ekspozicio vekis grandan intereson de la studentoj kaj multaj el ili esprimis deziron eklerni Esperanton.

La 95-a serio de p.m. emisiita (7-XI-1962) de Ĉinio por memori la 45-an datrevenon de la Oktobra Socialisma Revolucio.



V. I. Lenin 1-316 8c.

Sturmo al la Vintra Palaco 2-317 20c.



Agrikultura Sekcio de BEA

Fondiĝis sekcio de agrikulturaj kaj arbarkulturaj specialistoj kaj laboristoj ĉe Bulgara E-Asocio. La celo de la sekcio estas organizi specialistojn kaj laboristojn de agrikulturo kaj arbarkulturo, kaj utiligi Esperanton en tiu grava kampo scienca kaj ekonomia.

Tutmonda Urbatrafikista Esperanto-Federacio

Organizo de tiu ĉi nova faka federacio estis proponita de la Esperanto Fakrondo de Trafika Klubo en Hungario interkonsiliĝinte kun trafik-laboristoj de Sofio. Oni decidis, ke la fondkunsido okazu en sofio en 1963 dum la Universala Kongreso. Interesiĝantoj skribu rekte al la supra klubo (adr: Budapest IV. CSENGERY UTCA 68, Hungario)!

La Unua Hungara Somera Esperanto-universitato

Laŭ informo de Hungara Esperantisto lastjare okazis la unua hungara somera libertempa esperanto-universitato en la bela ĝardenurbo Gyula ĉe rumana landlimo. Ĝin partoprenis 120 esperantistoj el diversaj partoj de la lando.

Julio Baghy parolis en la somera universitato pri la his-

toriaj epokoj de Esperanto, s-ino B. T. Szerémi pri la laborista movado, P. Balkányi pri la esperantaj pacagadoj kaj aparte — anstataŭ la malsaniĝinta d-ro Kalocsay — pri la literaturo de Esperanto, prof. Ernesto Farkas pri la pedagogia uzado de Esperanto, d-ro Bálint Szemenyei pri la internaciaj rilatoj. Oni atendas pli grandskalan similan aranĝon en la kuranta jaro.

Kurso por Instruistoj en Pollando

En Gdańsk — Pollando, okazis de la 6-a ĝis la 26-a de julio 1962., la unua oficiala Somera Metoda Kurso por Esperantistaj Instruistoj. Ĝi estis organizita de la Sekcio de Polaj E-Instruistoj, ĉe PEA, helpe de la Ministerio de

Edukado en Pollando kaj la Kuratorejo por Lernejoj Aferoj en urbo Gdańsk. Partoprenis 52 instruistoj de fundamentaj mez-kaj faklernejoj el diversaj lokoj de la lando. Prelegis eminentaj landaj esperantistaj pedagogoj kaj profesoroj de universitatoj. La programo entenis 65 h. de prelegoj kaj 36 h. de praktikaj okupoj. La laborprogramo konsistis el 13 punktoj de diversaj temoj, nome: historio de Esperanto kaj E-Movado; historio de E-literaturo; elektitaj problemoj el la Esperantologio; metodo de instruado de Esperanto; elektitaj problemoj pri ĝenerala lingvoscio; modelaj lekcionoj pri geografio en Esperanto; reorganizo de lernejo en Pollando; praktika utiligado de Esperanto en diversaj branĉoj de la scio kaj en ĉiutaga vivo; Esperanto kiel la unua lingvo de la infano; praktikaj lecionoj kun diskuto; konversacio esperanta en grupoj.

Krome: okazis kelkaj agrablaj ekskursoj, i.a. per ŝipo sur la Balta Maro. La gekursanoj gastigis ankaŭ hungarajn samideanojn kun s-ano Francisko Dobos kiel ekskursiva gvidanto el Esperanto-Grupo de Elektra-Maŝina kaj Kabla Fabriko en Budapeŝto kaj tre spertan esperantiston, junan s-anon el Rostock — GDR. Gaja vespero kun kantoj kaj dancoj daŭris ĝis noktomezo.

Jan Smykalski

Grupo de gekursanoj. Meze, en la blanka ĉemizo s-ano prof. J. Smykalski.



Sur Nia Librobreto

L. L. Zamenhof: **PROVERBARO ESPERANTA** — alfabeto ordigita kaj provizita per indeksoj de C. Rogister. 19 × 12 cm. 196 paĝoj. Prezo: \$1.50.

William Gilbert: **PLANLINGVAJ PROBLEMOJ** (Esperanto kaj la Naturalismo) — 100 paĝoj. Prezo: \$1.00.

Henri Baupierre: **SPECIMENE — PARODIOJ KAJ PASTIĈOJ** — 138 paĝoj. Prezo: \$1.50.

Kahlil Gibran: **LA PROFETO** — 128 paĝoj. Prezo: \$1.00.

Jen denove 4 novaj libretoj el STAFETO prizorgata de la diligenta s-ano J. Regulo. Ili ĉiuj apartenas al “Beletraj Kajeroj” kaj kun la sama formato 19 × 12 cm. Mi tre ĝojas vidi tiel riĉajn fruktojn de la esperanta eldono nuna.

Ĉu ili estas rekomendindaj al la legantoj? Laŭ mi, ne ĉiuj. Tial ĉi tie mi intence preterlasos la du lastajn kaj priparolos nur la du unuajn.

PROVERBARO ESPERANTA certe estas unu el la plej valoraj perloj de la esperanta literaturo ambaŭ enhance kaj lingve. La valoro kaj ĉarmeco de proverboj ne kuŝas en tio, ke ili iafaje troviĝas sur la lipoj de iu ĉefministro kiu posedas eĉ portempan influon, aŭ ke al ili turnas sian atenton foje iu mondfama universitato, kiel iu asertis. Sed tute male, la vero restas kaj restos ĉiam en la plej ofte ripetata opinio, ke ili resumas la saĝon de la popolo. Ĉu troviĝas proverboj trivialaj aŭ malmoralaj? Tion mi ne neas absolute. Tamen ili tute ne povas prezenti la ĉefajn karakterojn de la proverboj. Krome, la proverboj, kiuj estas formitaj en la vivo mem, respe-

gulas la socian medion. Se en la vivo mem kaj en la socia medio troviĝis trivialaĵoj kaj malmoralajojne riproĉendaj estas iliaj spegulantoj — la proverboj. Male ili estas eĉ utilaj, ĉar ili povas liveri al ni materialojn por studo de la koncerna socio.

Rilate al la Proverbaro redaktita de M. F. Zamenhof kaj esperantigita de L. L. Zamenhof la esperantistoj jam ne bezonas ian superfluan vorton por rekomendado, des pli neniom ĝin koncernas la suprediritaj riproĉoj. Oni nur bedaŭris, ke ĝi estas longe ne akirebla. Do la nova eldono certe ricevos vastan aplaudon.

La indeksoj de la nova eldono estas tre utilaj, sed la nova ordigo ŝajne ne estas la plej ideala. La alfabeto viciĝo certe faciligas trovon de iu aparta proverbo. Sed al tia libro havanta nenian klarigon oni apenaŭ sentas tian bezonon. Estus pli bone ordigi la proverbojn laŭ la analiza indekso, t. e. laŭ klasifiko, por ke la konsultantoj tuj trovu la deziratan esprimon.

PLANLINGVAJ PROBLEMOJ estas tute nova speco de esperanta libro. Ĝi traktas ne sole Esperanton sed ankaŭ aliajn planlingvojn enkompare kun ĝi. Atentinde estas tio ke la aŭtoro foje forlasis Esperanton kaj dum preskaŭ 20 jaroj estis fervora adepto de *Occidental*, t. e. *Inter-*

S-ino Rkj. Ch. Sj Datoe Toemenggoeng Forpasis

S-ino Rkj. Ch. Sj Datoe Toemenggoeng, la prezidantino de la Indonezia Esperanto-Asocio, mortis je la 23-a de novembro 1962 pro malsano. Ŝi estis aktiva esperantistino en Indonezio kaj la fondintino de la landa asocio. Multon ŝi kontribuis al E-movado en tiu lando. Ŝia morto certe estas granda perdo de la indonezia E-movado. Ni esprimas nian funebron kaj kondolencas al niaj indoneziaj samideanoj. Ni esperas ke ili levos la postlasitan verdstelan flagon kaj daŭrigos la laborojn por la internacia lingvo kaj amikeco inter la popoloj.

Ĉina Esperanto-Ligo
Redakcio de E. P. Ĉ.

lingue, kiel ĝi estas nomata nun, de von Wahl kaj poste studis ankaŭ pri *Interlingva* kreita de I.A.L.A. Li do povas paroli pri Esperanto en komparo kun la du konkurantoj laŭ praktika sperto. Al esperantistoj tiu ĉi libreto donas pli firman kredon je la taŭgeco de ilia lingvo kaj al amikoj de la internacia lingvo ĝi ankoraŭfoje konfirmas, ke “por lingvo internacia ne sufiĉas nur nomi ĝin tia”.

Honfan

RESUMOJ KAJ KLARIGOJ DE TABELOJ KAJ FIGUROJ EL LA “JARLIBRO 1960” KAJ “JARLIBRO 1961” de la Instituto por Biologia kaj Kemia Esploro de Agrikulturaj Plantoj — Tiuj ĉi broŝuroj estas resume tradukitaj el la nederlanda lingvo de d-do G. F. MAKKINK. En ili troviĝas resumoj de 35 sciencaj artikoloj (22 por la “Jarlibro 1960” kaj 13 por la “Jarlibro 1961”) pri agrikulturaj plantoj, rilate al aerumado, temperaturo, akvoprovizado, lumintenso, efikado de sterkaĵoj ktp. El la resumoj oni povas certigi, ke la “jarlibroj”

(Daŭrigo sur p. 46)



Skribas

Niaj Legantoj

Aŭtentikaj Sciigoj

La revuo-enhavo estas interesa kaj mult-varia kaj ni povas el ĝi ricevi valorajn informojn pri via lando pri kiu oni cetere mal-ofte havas aŭtentikajn sciigojn. Viaj ilustraĵoj estas same interesaj kiel plej ofte viaj bildoj kiuj donas al ni enrigardon en la modernan, nuntempan ĉinian arton.

Mi povas al vi nur gratuli al via organo, al viaj lertaj kaj fervoraj kunlaborantoj kaj deziri al vi pluajn sukcesojn en la eldonado.

D-ro H. Frenzel, Aŭstrio

Por Prelegoj Kaj Lekcioj

Mi volas tute simple mencii al vi nur unu fakton. En la gazeto *El Popola Ĉinio* mi trovis ofte interesajn novajn faktojn por miaj prelegoj kaj lekcionoj, precipe pri la diversaj nacioj en Ĉinio kaj pri la rapidega evoluo de via lando. La gazeto tre bone konatigas Ĉinion en vastaj rondoj legantaj ĝin.

Akademiano P. Ariste, Sovetunio

Ankaŭ inter Ne-esperantistoj

Kun granda ĝojo ni anoncas al vi, ke 11 anoj de nia E-rondeto antaŭpagis vian gazeton, kiu kun sia riĉa enhavo fariĝas tre ŝatata ne nur inter anoj de nia E-rondeto, sed ankaŭ inter ceteraj kunlaborantoj — ne-esperantistoj. Tre ofte ni devas al ili traduki diversajn artikolojn pri via belega lando, pri lando, kies popolo marŝas ankaŭ al socialismo — al komunismo.

Z. Dvorak, Ĉeĥoslovakio

Harmonia Kunesto

Mi estas regula leganto de via revuo, kiu multe plaĉas al mi, ĉar pere de ĝi mi povis senpere kontaktiĝi kun la ĉina kulturo. Permesu al mi esprimi mian altan aprezon pri la ĝenerala etoso de *El Popola Ĉinio*, unika kaj alloga kunmetaĵo de malnoveco kaj moderneco, tradicio kaj ĝisdateco. Tiu ĉi speciala karaktero donas al ĝi tute apartan ĉarmon. Oni nepre ricevas la impreson, ke la hodiaŭa ĉina civilizacio laŭiras originalan vojon. La plej granda danĝero por ĉiuj landoj kun antikvaj tradicioj, en la momento kiam ili volas modernigi, estas tiu ĉi: ke ili facile malkonfesas ĉiujn siajn "bazojn", kaj iom post iom estas "platigitaj" sub la senkompata glatigilo de la amerik-tipa ŝablona modelo. Tial la tuta riĉega heredaĵo de la popola arto forvelkas, kaj la homoj fatale iĝas senradikaj plantoj.

En tiu ĉi situacio, estas tre kuraĝige kaj esperige por mi vidi, ke ne ĉiuj popoloj falas en la saman eraron. La harmonia kunesto de antikva tradicio kaj nuna moderneco — plej evidenta kaj okulfrapa karakterizo de via revuo — montras, ke la ĉina popolo kapablas iri la vojon de la civilizacio, suĉante inspiron kaj energion el siaj jarmilaj tradicioj, el la historio de sia popolo, el la originalaj formoj per kiuj ĝi esprimis sin dum la diversaj epokoj.

F. Franceschi, Italio

Plenumi Mision

Kun danko mi ricevis vian revuon dum la pasinteco kaj gratulas vin pro ĝia bela aspekto kaj pro la oftaj, riĉenhavaj arti-

koloj. Ĉi-tie en Skandinavio ni ne scias tro multe pri la vivo en Ĉinio nuna, estinteca kaj estonteca, kaj sur tiu fronto via gazeto plenumas modele sian mision. Speciale mi legas la artikolojn pri la folkloro de via popolo kaj la poemoj kaj rakontoj el la historia periodo, kaj tiuj artikoloj vere estas bonegaj.

L. E. Kroman Jensen, Danlando

Senpera Informiĝo

Nun iom pri la revuo: Mi legas ĝin de la unua numero, kiam ĝi ankoraŭ estis grandformata. Ĉiam senpacience mi atendas la alvenon de nova numero. Kompreneble de la jaro 1957 ĝiaj numeroj laŭekstere estas multe pli plaĉaj. Kiam mi montras ĝin al ne-esperantistoj, al ĉiuj tre plaĉas la ekstero de la revuo, kaj ili envias min, ke mi povas kompreni ankaŭ la internon. Ja, ni esperantistoj havas la feliĉon senpere informiĝi pri la frata popolo ĉina.

Ladislao Somlai, Hungario

Feliĉa kaj Esperplena Vivo


Kun granda intereso mi ĉiam legas valorplenajn artikolojn en *El Popola Ĉinio*, kiu estas tiel bone redaktata, ke ni per ili povas havi ĝustan komprenon pri la ĉina popolo nuntempa. Kiel feliĉa kaj esperplena estas ĝia vivo nuntempe en via lando! Mi tre ĝojas ke Esp. plenumas en via gazeto plenplene sian oficon kiel internacia komunikilo.

S. Nishi, Japanio

De Komenco al Fino

Mi skribas al vi por la celo esprimi mian admiron pro via bela, bona gazeto! Mi legas ĉiun numeron de komenco al fino, kaj mi sendas mian sinceran gratulon al vi, ĉar la gazeto estas konstante bona kaj bela!

Leganto, Usono



Korespondi Deziras

* **Dan Popescu**, str. Unirii nr. 75, Turnu-severin, Rumanio, dez. kor. pri problemoj de historio, historio de religio kaj ateismo, studenta vivo, popola arto.

* Edukistsekcio de lerneja kura-torejo en Pollando dez. kontaktiĝi kun alilandaj mezlernejaj instruistoj de matematiko pri jenaj temoj: 1. Didaktikaj metodoj de instruado. 2. Programo de matematikinstruado. 3. Opinioj pri lernolibroj. 4. Tipaj eraroj farataj de lernantoj kaj rimedoj por forigi ilin. 5. Komparo de instruaj rezultoj. Skribu al: Georgo Malachowski, Gdansk-Wrzeszcz, Aleo Wojska Polskiego 33 B, Pollando.

* **Okdek 15-16-jaraj lernantinoj** kun samaĝuloj el ĉl. Skribu amase al: III-a Pedagogia Liceo, Wroclaw, str. Swierczewskiego 27, Pollando.

* Itala instruisto **Filippo Franceschi**, str. A. Boito, 6, Padova, interes. desegnojn de siaj gelernantoj (5-a klaso de elementa lernejo — Padova, Italio) kun desegnoj de alilandaj lernejoj. Landoj preferataj: Ĉinio, Anglio, Bulgario, Islando, Japanio, Rumanio, skandinavaj landoj, Sovetunio, Vjetnamio.

(Daŭrigo de p. 44)

enhavas tre valorajn sciencajn esp.orojn kaj indas esti vaste konigitaj kiel intencas la tradukinto. Laŭ anonco en la resumoj tiujn librojn aŭ repesaĵojn de la dezirataj artikoloj oni sendos laŭpete al interesiĝantaj institutoj aŭ esploristoj. Interesiĝantoj do skribu al la instituto en Wageningen, Nederlando.

F.

* S-ro **Vaclav Kral**, E. Destinove 550, Milevsko, Ĉeĥoslovakio, dez. kor. k interes. alumetetiketojn kontraŭ ĉeĥoslovakaj alumetetiketoj, pm aŭ fotoj de filmaktoroj. Li ankaŭ serĉas korespondantojn por anoj de rondeto de kolektantoj de alumetetiketoj. Respondo certa.

* S-ro **Josef Fara**, Petra Bezruce 768, Milevsko II, Ĉeĥoslovakio, dez. kor. k interes. pm. Certa respondo.

* S-ro **Dobromir Sumtny**, Sepekov 273, p Milevska, Ĉeĥoslovakio, dez. kor. k interes. pm. Certa respondo.

* **Junulara Esp. Klubo "Juneco"**, a/d 16, Vilnius C, Litovio, USSR, dez. kor. kun ĉl pri ĉt kaj volonte interes. librojn.

* **20 junaj gelernantoj (16-19j.)** dez. kor. kun samaĝaj geamikoj el Ĉinio, Mozambiko, Japanio, Vjetnamio, USSR, Usono, ĈSR, Indonezio. Respondo garantiata. Skribu al: S-ro Walter Petzold, Netzschkau i/Vogtl. Querstr. 3 Germanio — DDR.

* **Leon Di Francesko**, 2 Av. Campo Claro, Ed. Media Luna Af. 12, Garacas, Venezuelo, (32j. teknik-laboristo) dez. kor. kun ĉinaj, japanaj, vjetnamaj, indoneziaj ges-anoj pri literaturo, orografio, geografio, groto, akvofaloj k interes. bk.

* **Titica Zoe**, Calea Victoriei 124, etaj. 5, af. 18, raion. 30 decembrie, Bucuresti, Republica Populara Romina, dez. kor. kun ĉl pri kulturo, sporto k instruistaj metodoj.

* Bonvolu noti **la novan adreson de Vjaĉeslav Rojdestvenskij**: USSR, Ĉelabinskaja obl., g. Kusa, Gazeto "Trudovaje Ĵizu".

* **Willi Bennewitz**, Eisenweg 55, Karl-Marx-Stadt 17, Germana Demokrata Respubliko — DDR, dez. havi seriozan korespondadon kun s-anoj el Ĉinio k aliaj landoj de malproksima oriento.

* **Amadeu Dias**, C. P. No. 39, Mutarara, Mozambiko, Afriko, kun ĉinaj k orientaziaj esp-istoj pri ĉt. k interes. pm, ipk.

EL Popola Ĉinio

Dumonata Gazeto Eldonata
de la Ĉina Esperanto-Ligo

Redakcio: P. O. Kesto 77, Pekino,
Ĉinio

Adm.: P. O. Kesto 313, Pekino,
Ĉinio

Enhavo de N-ro 1 (78) 1963

Bildo sur kovrilo: *Argilaj Pupoj el Hujŝan*

La Nova Fizionomio de Pekino

La Lulilo de la Oktobra Revolucio

Instruistino Du

En la Vasta Sovagejo

Li Baj

Poemoj de Li Baj

Lampo

Intimaj Amikoj de la Legantoj

En Miljara Tombo

Post la Solokoncerto

Skizoj pri Junnan-provinco
(Poemoj)

Kuracisto

La Argilaj Statuetoj el Hujŝan

La Ŝaŭhing-a Rizbrando

Luŝeng-o

Demando pri Fiŝado

Ĉipaŭ-o — Robo Ŝatata de Ĉinaj
Virinoj

Dia Dono

La Fadena Ludo

La Eksperimenta Instruado de
Esperanto en la Geknaba Mez-
grada Lernejo de Somero
(Soumio)



Esperanto Marŝas

Efikaj Rimedoj por Amikeco kaj
Kultura Interfluo

Sur Nia Librobreto

Skribas Niaj Legantoj

Korespondi Deziras



Supre:

Kruta pasejo en Jijang-gubernio,
Gianghi-provinco

Supre-dekstre:

Pejzaĝo simila al pentraĵo (Ŝaŭhin,
Ĝegiang-provinco)

Dekstre:


Giganta ŝtonstatuo de budho en
Luoŝan, 120 metrojn alta, kies
skulptado plenumiĝis de la komen-
co ĝis la fino de la 8-a jarcento.

ĈINAJ POŝTMARKOJ

LA OPERA ARTO DE MEJ LANFANG

La 94-a serio de 8 p.m. emisiita (8-VIII-1962) de la Ĉina Poŝto por memoriĝi "la Operan Arton de Mej Lanfang", la elstara nuntempa dram-artisto de Ĉinio.

- | | | |
|---|-------|------|
| Portreto de Mej Lanfang | 1-307 | 4c. |
| Liang Hongju en "Rezisto kontraŭ la Invadantoj de Ging-regno" | 2-308 | 8c. |
| Du Liniang en "Interrompita Am-songo" | 3-309 | 8c. |
| Ju Gi en "La Brava Reĝo Adiaŭas al Sia Favoratino" | 4-310 | 10c. |
| Mu Gujĵing en "Mu Gujĵing kiel Komandantino" | 5-311 | 20c. |
| Feino en "Feino Dissutas Florojn" | 6-312 | 22c. |
| Han Juniang en "Senfina Bedaŭro" | 7-313 | 30c. |
| Ĝaŭ Janjong en "Belulino Defias Tiranon" | 8-314 | 50c. |



POPOLAJ DANCOJ DE ĈINIO

La 49-a serio de 6 p.m. speciale emisiita (15-X-1962) de la Ĉina Poŝto kun bildoj pri "Popolaj Dancoj de Ĉinio".

- | | |
|-----------------------------|------|
| Popola Danco de Han-nacio | 4c. |
| Mongola Popola Danco | 8c. |
| Popola Danco de Ĝuang-nacio | 10c. |
| Tibeta Popola Danco | 20c. |
| Popola Danco de Ji-nacio | 30c. |
| Ujgura Popola Danco | 50c. |

